# BULTENO DE LA ALBANA ESPERANTO-INSTITUTO

**Nr 48 Au'gusto 2003**
**Adreso: p/o Bardhyl Selimi Rr. Maliq Muço P.50 A.3 Tiranë Albanio**
**Telefonoj: +355 4 241272 (Vasil, prezidanto); +355 4 238 558; ++355 68 25 80 758 (Bardhyl , sekretario); +355 4 363360 (Rita , kasistino)**
**Rete:** pistolii@email.com (Vasil); selimib@albmail.com (Bardhyl); adoci@gmx.de (Artur) ; shhasani@albmail.com (Shaban); hamotto@aul.com.al (Martha) **;** beqirajs@hotmail.com (Saimir Beqiraj) ; matildasokoli@yahoo.com (Matilda ; (Ariel) a_myrazi@yahoo.com ; sambeg2000@yahoo.com (Saimir Begollari); dpermeti@amc.al (Rita); dorian77@hotmail.com (Doriani); mgumeni@lincoln.org.al (Jon); hysaerald@yahoo.it (Eraldi); ereid@wp.pl (Ereidi)
**Retpag'o** : http://www.esperantio.tk

**La enhavo de tiu c'i numero**

Nova sesio de bakalau'rig'o
Rilatoj AIS-AEI-korespondo kun studentoj
Rilatoj :Universitato de Karlovo kaj Ni-kunlaborpropono
Vizito de francaj amikoj
Geedzig'is samideano Saimir Beqiraj
Forpasis la edzino de s-ro Vasil Pistoli
Ni dankas..
Informaj'oj de amiko Henri Masson
Notoj pri Auguste Forel-de Andy Kunzli
Vojag'impresoj -Portugalio
Savig'o de hebreoj en Albanio
Poeziaj'oj
Religiaj kredoj en Albanio-deplomlaboraj'o

**La nova sesio de bakalau'rig'o**

Baldau' ekde 16a de septembro g'is 23a deseptembro okazos c'e Karlovo-Internacia Universitato en Bulgario, kies rektoro estas s-ro Boj'idar leonov nova sesio de bakalau'rig'o. C'i jare bakalau'rig'os la studnetoj Edi pashaj, Andi Berberi, Ervin C'anga, Anri Subashi ka kaj magistrig'os Ariel Myrazi kaj Ereid Dhimitri. C'iuj ili jam pretigis sin al tiu grava evento kaj plejparto jam ricevis la invitleterojn senditaj afable de rektorejo de tiu Universitato. Sukcesojn al niaj studentoj!

**Rita Permeti**

**<u>RILATOJ AIS-AEI</u>**

**Korespondo:**
Estimata bakalauro Dhimitri,
Hodiau mi ricevis de vi kompletigon de via ekzamendosiero por magistra ekzameno dum la ProvSUS en Karlovo. Estas mia tasko kontroli la plenumitecon de la studado de la kandidatoj. Bedaurinde lau la informoj, kiujn mi havas, vi ankorau ne akiris la sufic^an kvanton de studunuoj. Lau la ekzamenregularo la kandidato bezonas almenau 80 studunuojn aldone al la 40 konsumitaj por la bakalaura ekzameno - do entute almenau 120. Lau mia registro vi havas 50 administraj studunuojn, el kiuj rezultas - pro la sukcesaj kursfinak ekzamenoj - 81 rezultaj studunuoj, do konsiderinde malpli ol la postulataj 120. Mi algluas la vin koncernantan parton de la registro - bv. *nepre* informi min, c^u en tiu registro mankas agnoskeblaj studunuoj - alikaze ni ne povas allasi vin al magistra ekzameno. Por memoro:
Agoskeblaj por la AIS-studado estas kursoj de:
- profesoroj au aliaj docentoj de AIS
- ASci kun grado de doktoro
- aliaj ASci kun aprobo de la dekano
- personoj kun habilit-doktora grado
- personoj, kiuj regule instruas en s^tata au s^tate agnoskita universitato

G^is la studjaro 2001/2002 estis agnoskeblaj de la ISTK-kursoj de Mielcarek, Kowalczyk, Sudol, Grzebowski, Grzebowska, Bondar, ekde la studjaro 2002/2003 aldone - kun aprobo de la dekano - de Bedkowska kaj Casquero Sed ekde la studjaro 2002/2003 AIS-atestojn ricevas de AKB nur AIS-studentoj por kursoj, kiujn ili finis kun sukcesa kursfina ekzameno (minimume 6 poentoj). G^is nun mi registris de vi neniun agnoskeblan kurson el la studjaro 2002/03 Sekvas nun eltranc^aj^o de la Listo de atestitaj kursoj de AIS por studento no 1047: Dhimitri , Ereid , naskita 1979-08-19 en TiranÃ« (AL ) legitimil-no:
BM 187 2004 MM 028 2006, Kodo Sekcio Studunuoj, Noto Rez.Std.un , Lingvo Docentoj Titolo Komenco [Plej gravas la 5a kolumnno: "Rezultaj studunuoj"] ISTK_1998 2 3 8 6 ilo Bondar: Baza Cseh-kurso de Esperanto 1998-09-01 ISTK_1998 2 3 8 6 ilo Bondar: Seminario pri Cseh-metoda lingvoinstruado, grado "A" 1998-09-01 ISTK_1999 2 4 8 8 pl Zastempowski Zawichrowski Barcikowska Bondar Kurs wykÅ‚adowcÃ³w jÄ™zyka Esperanto [Kurso por kursgvidantoj de Esperanto] 1999-09-01 ISTK_2000 2 3 8 6 ilo Bondar: Seminario pri Cseh-metoda lingvoinstruado, grado "B" 2000-09-04 ISTK_2000 2 4 8 8 pl/ilo Zastempowski Zawichrowski Barcikowska Bondar. Kurs wykÅ‚adowcÃ³w jÄ™zyka Esperanto / Kurso por kursgvidantoj de Esperanto 2000-09-04 ISTK_2001 6 20 7 30 pl/ilo GrzÄ™bowska GabaÅ"ska Sobolewski Brzozowski: Kurs pilotaÅ¼u wycieczek / Kurso pri vojaÄ•gvidado 2001-09-03 SUS_24 1 1 8 2 ilo Frank Corsetti : Planlingvopsikologio 2001-09-21 SUS_24 2 1 0 1 ilo Eichhorn: Terapio de psikozoj: historio kaj nuntempo 2001-09-21 SUS_24 4 1 0 1 ilo Angstl: Elementa kurso pri logiko 2001-09-21 K_SUS_24 6 1 0 1 ilo Leonov: Informadiko kaj la ekologia ekspertizo 2001-09-21 SUS_24 6 1 7 1,5 ilo PolÃ¡kovÃ¡: Amaskomunikiloj en multkultura edukado 2001-09-21 PL_21 2 1 9 2,5 pl/ilo Sadownik: Komunikacja interpersonalna / Interpersona komunikado 2002-04-25
PL_21 4 1 0 1 ilo/pl Lechowski: La teoriaj bazoj de la sukceso kaj feliÄ?o 2002-04-25
PL_21 6 1 0 1 ilo Mielcarek: Azio de Kataro Ä•is Orienta Timoro 2002-04-25
PL_21 6 1 0 1 ilo Mielcarek: Australio kaj insuloj de Pacifiko 2002-04-25

PL_21 6 1 0 1 ilo Pachter: Ekologio en Berlino 2002-04-25
BUS_4 5 1 8 2 ilo Lewanderska-Quednau: Preventa kaj kuraca naturmedicino 2002-09-21 BUS_4 6 1 0 1 ilo Leonov: Juraj aspektoj de ekologia turismo 2002-09-21 BUS_4 6 1 0 1 ilo Lobin: Enkonduko al eÅ-rologio 2002-09-21 Sumo de la administraj studunuoj: 50 Sumo de la rezultaj studunuoj: 81
Signifo de la kodoj :

ISTK_1998 = studjaro 1998/99 de ISTK
PL_21 = 21a pola studadsesio

**Elkore salutas**
**Dieter Quednau**

**Karaj bakalauroj Myrazi kaj Dhimitri,**

SJ^us alvenis perpos^te la dua parto de la ekzamendosiero de A.Myrazi. Kvankam mi ankorau ne c^iujn detalojn kontrolis, mi povas jam diri, ke la amplekso de rezultaj studunuoj sufic^as por esti allasata al magistra ekzameno. Kion koncernas la responson de la klerigofico (t.e. kontrolo de la studado), por A.Myrazi estas c^io preta. E.Dhimitri devas ankorau en Karlovo akiri 3 studunuojn (el ili unu kun noto, unu el la sesa sekcio, unu el alia ol la sesa sekcio). Pri aliaj kondic^oj responsas Prof. Lobin, kiu estas komisiita de la direktoro de la ekzamenofico, Prof. Minnaja. (Mi ekz. supozas, ke al ambau mankas ankorau unu fakekzameno) [Per "ambau" mi celas Myrazi kaj Dhimitri, ne Minnaja kaj Lobin :-)] Pri aliaj kandidatoj el Albanio mi ne havas informojn.
Mi antaug^ojas la revidon en Karlovo kaj deziras multan sukceson

**<u>RILATOJ UNIVERSITATO DE KARLOVO-AEI</u>**
**Kunlabor- Propono de s-ro Boj'idar Leonov**

Kara Amiko
Kore mi dankas por Via letero kaj kun g^ojo ni akceptas la alig^on de Via grupo.Por prepari kaj siatempe sendi la oficialajn invitilojn kun registrado en la Polico kaj Jug^ejo mi urg^e petas sendi la jenajn informojn por c^iuj kiuj deziras partopreni la Sesion en Karlovo :

Nomo ,Adreso,naskig^dato/tago,nonato,jaro/ Naskig^loko kaj numero de la pasprorto.Ni certigos por niaj albanaj geamikoj tranoktadon po 5 euroj po nokte/35 euroj por 7 tranoktoj/

Delonge mi intencis skribi al Vi, proponante pli aktivan kunlaboradon inter ni,sed bedau^rinde dum la lastaj monatoj mi estis ege okupata kun la oficiala s^tara registrado de nia Universitato kaj kun la problemoj de reorganizo de tute nova "Monda turismo " kun sidejo en Bulgario- mi esperas ,ke Vi jam tralegis la proponon de BEA pri refondig^o de la inrenacia E-turisma ligo,sendependa de komercaj intresoj kaj mi uzas la okazon inviti Vin

kunlabori kun ni.Se estas necese mi pli detale informigos Vin pri nia agado en tiu direkto.

Sed nun pli grave mi deziras proponi al Vi kunlaboron kunligita kun nia Universitato-Mi tute oficiale,proponas al Vi,fondi en Albanio FILION de Internacia Universitato Karlovo-parto de la studado de la albanaj studentoj estu en Albanio/surbaze de interkonsentita kun ni programo/ kaj kompreneble ankau^ studado en Karlovo surbaze da la programo de AIS kaj oficialaj bulgaraj studadpropramoj.Kompreneble ankau^ parto de la kolektotaj studadkotizoj restos en Albanio.La studentoj post la fino de la studado ricevos bulgarajn kaj AIS-diplomojn kaj ankau^ se ili deziras povus poste dau^rigi la studadon au^ specialig^i en bulgaraj s^tataj Universitatoj.Mi proponas al Vi en tau^ga por Vi tempo venu en Karlovo kaj ni pridiskutos pli detale .Ankau^ mi uzas la okazon inviti Vin por la Sesio en Karlovo-mi certigos senpagan Vian restadon en Karlovo .

Kun plej koraj salutoj

**Tutkore Via : Bojidar**

**Vizito de francaj amikoj**

Antau' nelonge je 4-5 au'guston 2003, lau' invito de samideano Ing . Shaban hasani vizitis nian landon geparo franca kun gefiloj. Ili alveturis el Grekio kie ili pasigis libertempon. J'ilbert, profesia fervojisto en Strasburgio kaj liaj gefiloj Boris kaj Marlen, same la honorinda edzino, profesorino en medicinista altlernejo, pasigis agrablajn vesperajn horojn je akompano de Shaban , lia filo Fatmir kaj s-ano Bardhyl kaj Ariel en Tirane. Morgau'on ili renkontis frua'linon Mimoza Muo, same esperantistino el Tirana.

**Saimir Beqiraj**

**Saimir Beqiraj geedzig'is**

Nia membro, S-ro Saimir Beqiraj, 30 jara, doktorig'anta pri biologio , geedzig'is . Je 6an de julio li arang'is koktejlon c'e restoracio "Ligo de Artistoj kaj verkistoj" en Tirana. Junedzino estas s-ino Doriana Kalamishi. Plej bonajn au'gurojn al la juna geedza paro!

**Matilda Sokoli**

**Forpasis la edzino de s-ro vasil Pistoli**

Post longa grava malsano , forpasis junie la edzino de s-ro Vasil Pistoli, s-ino Elefteri Pistoli. Ni kondolencas tutkore nian prezidanton kaj apreacas lian diligentecon dum prizorgado kaj flegado de lia kara edzino.

**Nehat Sokoli**

**Ni dankas:**

S-ron Jacques Tuinder pro notinda kontribuo en la pliric'ig'o de nia instituta biblioteko per granda kaj varia kvanto de esperantaj'oj. Ni dankas lin same pro afabla helpo al la blinduloj de Tirana, kiuj sekvis la Esperanto-kurson lastan printempon.

**Vasil Pistoli**

**Informaj'oj de Henry Masson**

Lau atentigo de Jean-François Clet aperinta sur la listo Esperanto-ATTAC (por enskribighi : <Esperantoattac-subscribe@egroups.fr>), sub la titolo "La mensogo de la angla -- La richeco de la scienco ligighas al la diverseco de la lingvoj", la semajngazeto

"Charlie Hebdo"  publikigis artikolon en kiu Guillaume Lecointre kondamnas la diktatorecon de la angla lingvo en la scienca eldonado. Charlie Hebdo: 44 rue de Turbigo 75003 Paris.
TRADUKO de eltirajho el la artikolo aperinta en la n° 572 de la merkredo 4-a de junio :
Niaj kadroj de la scienco postulas ke chiu konsekvenca sciencisto publikigu en la angla. Se vi estas kontrau, vi estas senrespondeca, pigra, ech ekstremdekstrula. Oni suspektas vin kashi vian senvalorecon malantau iu ajn preteksto. Necesas agnoski, ke estas pli avantaghe, je mallonga perspektivo,  submetighi al tiu lingva jugo ol ghin alfronti. Prepari studenton farighi serchisto en lia propra lingvo, tio estas pushi lin al profesia memmortigo. La komisionoj kiuj pritaksos lin rigados unue kian konsideron havas la gazetoj en kiuj li publikigis. La sistemo de la pritaksado de la sciencaj gazetoj, 80-procente angla-usona,  rilatas al la nombnro de mencioj : la sciencaj gazetoj kiuj esprimighas en la franca estas tuj malfavorataj. La franceparolantoj mem senvalorigas sian laboron plej ghuste esprimitan lau iliaj ideoj, t.e. la denaska lingvo. (...)
RIMARKOJ :
En mesagho de la 9-a de majo, Charles Durand skribis al mi (en la franca) :
"Mi havas la bedauron sciigi al vi ke la "politike tre malkorekta" karaktero de miaj freshdataj publikajhoj, kiujn vi konas, t.e. "La mise en place des monopoles du savoir" kaj "La nouvelle guerre contre l'intelligence",  kostis al mi la postenon de kontrakta dungito, kiun mi okupis en la universitato de teknologio de Belfort-Montbéliard ekde 1997.
Ni estas, konstateble, en nova periodo de obskurantismo kaj de intelekta terorismo, kiu estas reatingonta, pro ghia amplekso, la malnovan usonan makkartismon au la stalinismon de la eksa USSR."
Notindas ankau ke, en Le Monde, de la 25-a de marto 1992, longa artikolo de la grand jhurnalisto Jean-Pierre Péroncel-Hugoz atentigis pri la kuragha rezistado de nia amiko Claude Roux, nun direktoro de Serchado en CNRS (Nacia Centro de la Scienca Serchado), kunverkinto de impona verko en Esperanto pri likenoj, grava kunlaboranto de Michel Duc-Goninaz en la redaktado de la nova PIV, kontrau tiu premego.
James Rezende Piton (Brazilo) atentigis pri interesa citajho de Lula post lia partopreno en la pintokunveno de la shtatestroj "G8" :
"Nemalmulte ni faris rilate al ekstera politiko. La antauxjugxemuloj diradis, ke estas neeble, ke Lula regu la landon se li ecx ne scipovas la anglan. Kiel li povos paroli al Bush, al Tony Blair? Kaj mi pruvas, ke mi ne bezonas paroli la anglan por esti respektata".
En la bulteno "Espéranto Bretagne" n° 13 (15.05.2003) aperis la chi posta respondo, kiun sendis Catherine Lalumière al letero de Jean-Pierre Corbeau <jccorbeau@aol.com>
Lalumière (= Lalumo) vic-prezidantino de la Europa Parlamento; politika aparteno : Socialista Partio...;
TRADUKO :
"Kara Sinjoro,
Sinjoro Pierre G.. transdonis al mi vian leteron kaj la dosieron pri Esperanto, kiun vi deziris havigi al mi. Mi dankas vin pro via sendajho.
Mi komprenas vian intereson por tiu mirinda rimedo de komunikado, kaj via deziro vidi ghin uzata en la europaj institucioj.

Tamen mi devas konfesi al vi, ke mi estas apenau konvinkita pri ghia reala efikeco. Povas esti, ke mi estas "eksmoda". Sed, mi ne vidas kiel komunikadrimedo tre simpla povus prikonsideri la subtilajhojn de la penso. La kompleksekо de la lingvoj spegulas ankau la kompleksecon de la kulturoj kaj la richecon de la ideoj, kio kondukas min proponi prefere la lernadon de fremdaj lingvoj ol de Esperanto.
La estonteco diros al mi chu mi devas shanghi mian opinion. Momente, pardonu al mi se mi persistas en ultra-klasika ektraktado de la lingvajho kaj de la lingvoj.
Mi petas vin kredi, kara Sinjoro, je la esprimo de miaj distingitaj sentoj
**Catherine LALUMIÈRE**

*ANDY KÜNZLI*
**Auguste Forel (1848-1931) kaj lia vojo al la kulturo**

**Notoj pri forgesita „samideano“ kaj pri ties reelfositaj verkoj**

***Enkonduko***

*La vojo al la kulturo*[1] estas la esperantigita titolo de la ideologia c’efverko de Auguste-Henri Forel, eksterordinara svisa klerulo kaj sciencisto – kuracisto, psikiatro, formikologo, cerbanatomo, social-higienisto, verkisto, socia aganto kaj „enfant terrible” en siatempaj fakrondoj kaj soci-politikaj medioj, iriza personeco, kiu dum pli ol du jardekoj ec’ ornamis la milfrankan bileton de la Svisa Nacia Banko[2]. Per *La vojo al la kulturo*, ege leginda verko, Forel celis karakterizi la trajtojn – c’efe la malbonajn – de la moderna socio, analizi kaj kritiki ilin, samtempe montri al la homaro la vojon al la alta homa civilizo kaj pli supera socia moralo. En tiu pli alta homa civilizo trovas lokon ankau’ la ideo de la internacia helplingvo. Tial, c’ar Forel estis ankau’ signifa pacisto kaj humanisto, krome persona konato de L. L. Zamenhof, c’i tiu unika personeco estas por ni esperantistoj interesa kaj valora kaj tial meritas atenton kaj esploron.

Bedau’rinde, la forelaj libroj kaj pensoj, kiuj temigas la problemojn de la monda paco (FOREL 1916) kaj en tiu kunteksto ankau’ la internacilingvan ideon, ne sufic’e au’ tute ne eniris la konscion de la esperantistoj kaj aliaj adeptoj de planlingvoj. Nature, Forel ja ne estis Esperanto-movadano en la kutima senco, sed li tamen apartenas al la klasikaj teoriistoj de la mondhelplingva ideo kaj de la Esperanto-movado. Pro sia spirita proksimeco al esperantismo, la forelaj verkoj *La vojo al la kulturo* kaj *Kulturceladoj de la Nuntempo* (FOREL 1911 b), kiujn ni traktos sube, devus lau’ mi esti konsiderataj samrange kun *Interpopola Konduto* (Budapest 1935) de Edmond Privat (1889-1962) kaj kun la pedagogiaj verkaj’oj de Pierre Bovet (1878-1965), du aliaj gravaj svisaj sociaj agantoj, konataj ankau’ kiel fortaj apogantoj de la internacilingva ideo.

La esperanta fakliteraturo nur magre mencias Forel[3]. *Enciklopedio de Esperanto* (kiu aperis du jarojn post la morto de Forel, Budapest 1933) mencias lin lige kun liaj

1 FOREL 1924; vd. la bibliografion en la fino.
2 Serio valida dum la 1970-90aj jaroj.
3 Kp., por ekzemplo, la nekrologan noton de P. [Edmond Privat?] en: *Esperanto* 27. 1931: 373/74 (9/10), p. 137.

verkoj pri la seksa problemo[4] kaj lia esploro de la homa cerbo, „kiun li volonte komparis kun tiu de la formikoj…”. Notite estas ankau’, ke li estis „fidela membro de UEA, al kiu li regule pagis sian kotizon [kaj] subtenis nian movadon, en kiu li vidis grandan ilon por forigi malsau’ajn barilojn inter homoj kaj popoloj.” En *Esperanto en Perspektivo* (LAPENNA k.a. 1974, p. 260) trovig’as unusola noteto pri Forel, nome ke en 1911 aperis lia verko *Kulturceladoj de la Nuntempo* en la traduko de Friedrich Uhlmann. Pri tiu teksto ni parolos sube. STOJAN listigas kelkajn titolojn el la verkaro de Forel, i.a. *La vojo al la kulturo*, kun g’ia origina germana titolo. *Svisa Espero* alportas la nomon de Forel nur malofte, ekzemple en 1911 (numero 2-3) kun raporteto pri la apero de *Kulturceladoj de la nuntempo* en la traduko de Uhlmann, en 1919 (julia numero) lige kun la reformo de la Esperanto-alfabeto, kiun Forel subtenis, kaj en 1934 (3a numero) pri la projektita starigo de monumento honore al la mortinta sciencisto.

Cetere, *Schweizer Lexikon 91 in 6 Bänden* (Luzern 1992) mencias la pledon de Forel por la unuig’intaj s’tatoj de la mondo, lian alig’on al la socialismo kaj la bahaa movado, sed forgesis noton rilate lian interesig’on pri la mondhelplingva afero. Tiel, c’i tiu aspekto de la forela agado ankau’ ne farig’is konata al la nacilingva publiko.

Por pli bone kompreni tiun interesan personecon kaj lian sintenon al Esperanto kaj la internacia helplingvo, koni tiujn modestajn faktojn ne sufic’as. Necesas do konsulti lian verkaron mem, antau’ c’io lian au’tobiografion *Rerigardo al mia vivo* (FOREL 1935) kaj *La vojo al la kulturo.* La spirita proksimeco de tiuj verkoj en multaj rilatoj al la c’efaj referencoj pri la „interna ideo” kaj la homaranismo pravigus ec’ ilian republikigon en Esperanta traduko

…..En 1912-13 li observis la Balkanan Militon kaj verkis la traktaj’on „La balkanaj s’tatoj kaj la ebloj de ilia unuig’o”[5] Forel verkis ankau’ la pledojn „Milito au’ ligo de popoloj?“ kaj „Unuig’intaj u’tatoj de la Mondo”, kie li aprobis la ideon de mondhelplingvo[6]. C’i tiuj verkaj’oj proksimigis lin al la pacmovadoj en Svislando kaj Nederlando. Kompreneble, neniu interesig’is pri tiu alvoko.

## Forel pri la mondhelplingva ideo kaj Esperanto

En la kunteksto de la „vojo al la kulturo” (etike kaj kulture), unuig’o de la popoloj (politike-ekonomie) kaj raciig’o de la lingvolernado (pedagogie kaj socie), Forel uzis plurajn okazojn esprimig’i pri senco kaj esenco de la mondhelplingva ideo. Pro la apero

[4] Vd. FOREL 1905. En 1928 ekzistis tradukoj de la libro en la lingvoj germana (multaj reeldonoj), sveda, dana finna, angla, itala, hispana, nederlanda, rusa, pola, bulgara, serba, c’eh’a, slovaka, portugala kaj hungara. C’i tiun temon traktas ankau’ FOREL 1906 a kaj 1906 b.

[5] Die Balkanstaaten und die Möglichkeit ihres Bundes. En: *Zentralschweizerischer Demokrat*, 16. 06. 1913.

[6] Vd. FOREL 1914 kaj 1924. Kadre de tiu verkaj’o Forel traktas la temon pri la internacia helplingvo. La temon unuig’intaj s’tatoj de la mondo Forel mencias ankau’ en la antau’parolo al JOST.

de multaj planlingvaj projektoj en la 19a jarcento, precipe de Volapük (1879), la planlingva temo siatempe estis sufic'e populara kaj diskutata en diversaj cirkloj kaj medioj. Ankau' Forel interesig'is pri g'i kaj verkis c'i-koncerne plurajn favorajn eseojn, kiujn ni c'i-sube prezentos kaj reproduktos.

Necesas memorigi, ke Forel ne estas konsiderebla kiel apartenanto al la Esperanto-movado en la kutima aktivula senco, sed lin sendube eblas listigi al la klasikaj teoriistoj de la mondhelplingva ideo kaj de la Esperanto-movado.

**El „Rerigardo al mia vivo"**

En siaj memuaroj *Rerigardo al mia vivo* (FOREL 1935) Forel raportas, ke apud la demandoj pri rasoj, virinaj rajtoj kaj la seksa problemo, okupis lin „la demando de la internacia lingvo, pli g'uste de la mondhelplingvo, kiu senlime akcelus la internacian pacon kaj la reciprokan interkomprenig'on. Mi komencis studi Volapükon kaj poste transiris al Esperanto." (p. 157/58). Komence de 1906 Forel eklernis Esperanton: „Tiam, mi lernis dum plenaj kvin horoj la internacian lingvon de Zamenhof, se ne paroli, tamen almenau' legi kaj skribi g'in, tiel ke la 28an de Augusto [1906] mi povis c'eesti la Esperanto-kongreson en G'enevo kaj tie sufic'e bone povis kompreni la flue eldiritajn paroladojn. La anglojn mi komprenis multe pli bone en Esperanto ol en la angla. La kongreso, dum kiu mi persone konatig'is kun Zamenhof, tre entuziasmigis min, kaj sekvontjare mi faris al mi la plezuron priskribi formikan specion en iu Esperanto-gazeto." (FOREL 1907)

Sed unue ni reiru al pli fruaj tempoj kaj konatig'u kun la komencoj de la okupig'o de Forel pri la internaci-lingva ideo.

….Koncerne la rolon de la angla lingvo kiel internacia li tre skeptikis pro du kialoj: la angla estas nefonetika, kaj pro envio al la monopolo de unusola lingvo, la ceteraj nacioj ne agnoskus la anglan en la rolo de internacia lingvo.

La kondic'oj de mondhelplingvo, listigitaj de Forel, estas la neceso je internacieco de la radikaro, je fonetikeco, je simpleco de la sintakso kaj je g'ia rolo kiel lingvo tau'ga por scienco, arto, filozofio kaj komerco. Kiel ekzemplojn de mondhelplingvaj projektoj, kiujn Forel konis kaj kiujn li opiniis konformaj al la supraj postuloj, li nomas la projekto(j)n de la au'stro Julius Lott[7] kaj Pasilingua[8]. Forel lau'dis tiujn projektojn, c'ar lau' li ili meritplene anticipis la realig'on de la mondhelplingva ideo. En la kazo de la lingvo de Lott, Forel aldonis du tekstospecimenojn. S'ajnas, ke la naturalismaj variantoj

[7] Pri Julius Lott (1845-1905) kp. GOLDEN kaj JANOTTA.

[8] En la artikolo *Terminologie*…(FOREL 1902) Forel parolas pri „Esperanzo mit seiner Pasilingua". Vers'ajne li miksis du aferojn. Au' li efektive celis la projekton *Pasilingua* de Peter Steiner, kiu en 1885 estis eldonita en Germanio, au' li svage au'dis pri la projekto de L. L. Zamenhof (kiu pseu'donomis sin *Dr. Esperanto* kaj sian lingvon *Lingvo Internacia,* aperintan en 1887). C'ar pri Esperanto Forel ankorau' ne parolas en tiu artikolo, do supozeble li efektive celis Pasilingua.

en planlingvoj plac'is al Forel – ili nepretervideble similas al tiuj projektoj, kiuj kelkajn jardekojn poste naskig'os sub la nomoj Occidental-Interlingue (1922) kaj Interlingua/IALA (1951). Kvankam en la 20aj jaroj Occidental iom furoras (ekde 1927/28 pli konscie ankau' en Svislando, precipe Romandio), g'in Forel s'ajne preteratentas – temas pri liaj lastaj vivojaroj kaj la memoroj en *Rerigardo al mia vivo* c'esas en 1919. Idon li kritikas en *La Vojo al la Kulturo* (vd. sube) kaj Esperantido (1919) el la plumo de la g'enevano René de Saussure (1868-1943) estas almenau' menciita sur p. 275 de lia au'tobiografio *Rerigardo al mia vivo*. Tie, Forel bedau'ras, ke la reform-ideoj de Saussure en la alfabeto nur parte kongruas kun liaj propraj.

Konsiderante Volapukon forpasinta (en 1902), Forel esperis fine de sia artikolo, ke elstaraj personecoj pluokupig'os pri la ideo de la mondhelplingvo kaj laboros favore al g'ia realig'o kaj plukonstruo kaj pluevoluo.

## <u>Vojag'impresoj</u>

### Vojag'o tra Portugalio

Nia vojag'o tra Portugalio estis tre bela, kaj g'i indus pli poezian kaj pli koloran priskribon, sed mi timas ke mia raporto estos sufic'e seka. Unue: c'io senakcidente evoluig'is. Krom du okolvitroj por legi, kiujn mi perdis (unu estis poste sendita de la flughaveno Frankfurt), ne estis paneo. Oni montris multon al ni, suden ni veturis g'is Setubal kaj Evora, norden g'is Braga kaj Guimaraes.

Speciale por mi la tuta afero estis tre bela, c'ar tiu vojag'o flankas mian lernadon de la portugala. Kvankam mi ne daure kaj senzorge babiladis, tamen mi bone profitis. Ofte dum la vizitoj mi havis okazon pensi al faktoj kaj aferoj, pri kiuj mi jam audis au legis, kaj mi emas daurigi la lernadon de la portugala. Nia c'ic'eronino bone konis sian landon kaj ofte s'i donis konsilojn pri portugala au germana literaturo. Kaj kelkajn librojn mi jam povis per interreto venigi.

Ni estis 19 vojag'antoj, la plej multaj jam maljunuloj, tiel la rapideco de la vizitoj ne estis tro freneza, fakto kiu plac'as al ni: ni volonte tre zorge volas rigardi kaj studila objektojn. Pli ol kutime ni havis libertempon, ankau tion ni s'atas, c'iam ni trovis ion farindan, ofte ni vizitis muzeon au aliajn vidindaj'ojn, kiujn la oficiala programo flankenlasis. Unufoje ni ec' je la deksepa horo utiligis la terure plenan transurban buson en Porto, kaj trafis tre afablajn landanajn helpantojn.

Tri noktojn ni pasigis en Lisabono en tre elganta hotelo en la urbocentro. Estis agrable, ke ni tiel tuj piedirante povis atingi interesajn punktojn. En la lando ni kelkfoje tranoktis en t.n. Pousadas, historiaj domoj, monah'ejoj au palacetoj, ekz. En Evora: la urbo situas sur monteto, la historia centro en la plej alta parto. Tie ankau estis la Pousada, iama monah'ejo, kaj la templo de la romianoj, la unu-nura en tuta Portugalio, kiu estas pli-malpli intakta. La hotelc'ambro do estis iama monah'a c'elo. Tiu c'elo ne estis malgranda, tamen post instalado de aparta banejo restis nur mallarg'a koridoreto c'irkau la lito. Sed estis agrablaj kromaj salonoj au ejoj, kaj kiam post la vespermang'o oni iomete volis promeni: tuj antau la pordo maldekstren trovig'is la templo en dumnokta lumigo.

En urbo Porto ni havis neregulan aventuron. La vesperon de nia alveno okazis la fina decido de iu europa piedpilka kompionado. La fina ludo okazis en Sevilla, Hispanio, sed gajnis la klubo de Porto. Nia hotelo situis en la malnova centro, nia c'ambro estis malantauen, kaj rigardis super du stratetoj. Je la alia flanko estis kafejo, tutplena, kiel oni bone povis vidi de nia fenestro. C'iuj gastoj senmove rigardadis la televidon, trankvile sidantaj, koncentritaj kaj silentaj. Nur kiam la ludo vere finis, la homoj salte ekstaris, brakumis unu la alian, saltetis kaj kriis. Tuj la stratoj estis plenaj je lautaj automobiloj kun junuloj kiuj s'vingis fanojn kaj klaksonis. Kompreneble ig'is lauta nokto, la neniam-laculoj iris je la tria nokte al la stadio por aplaudi kaj saluti la revenintan teamon. Sed tion ni nur eksciis la postan matenon de nia c'ic'eronino: ni ne partoprenis tiun eventon.

Kio min plej multe impresis? Unue la alveno en Lissabon, kiam la aviadilo tre malalte kaj malrapide flugis super la du grandegaj pontoj kaj super la lago do Tejo, kiu aspektis senlima kiel maro. Due la haveno de Lisabon, kie trovig'as la Padrao, la Belema turo kaj la J'eronima monah'ejo, c'ar de tiu punkto ekveturis la kurag'egaj esploristoj, pri kiuj ec' hodiau la portugalanoj tiel fieras. Poste la konsktruaj'oj de la Manuela epoko, la fabela kasteleto de Busako, la monah'eja komplekso de Batalha, kaj Alkobasa, kie estas la tombejoj de D.Pedro kaj D. Ines de Kastros. Krome la naturo kaj pejuzag'o, c'efe la Alta Alentej'o kaj la arbokovrita montaro de Arrábida. Au c'u la famaj azulej'oj plej multe plac'is al mi? Almenau mi ne povis resisti, kaj mi fotis ilin c'iam denove, kiam mi trovis au ekzaltitajn historiajn au ironiajn kaj humorajn ekzemplerojn.

**Hartmut Fillmann, majo 2003**

## LA SAVIG'O DE HEBREOJ EN ALBANIO

La dua mondmilito estis granda malfelic'o por c'iuj popoloj de Eu'ropo sed g'i estis aparte tragika por hebreoj. Estas sciite ke la strategio de pereigo de hebreoj ne povis realig'i mem de nazioj se ili ne sin apogis sur la lokaj autoritatuloj kaj ties lakeoj.

Bons'ance en Albanio nazioj ne trovis tiajn kunlaborantojn nek c'e autoritatuloj , nek c'e la ordinaraj homoj.

Irene Grunbaum en sia autobiografia libro pri sia transvivo "Escape Through The Balkans" (Eskapo tra Balkanio) post kiam priskribas s'iajn travivaj'ojn kiel rifug'inton en Serbio kaj Makedonio, en la resuma paragrafo pri Albanio diras: "Adiau' Albanio, mi pensis. Vi estas donacinta al mi tiom multe da gastamo, rifug'o, amikoj kaj aventuroj . Adiau' Albanio. Alvenos la tago kiam mi rakontos al la mondo ke kiom bravaj, sentimaj , fortaj kaj fidelaj estas ja viaj gefiloj , ke kiel la morto kaj diabolo ne povas fortimigi ilin. Se necesos , mi rakontos kiel ili protektis min , rifug'inton kaj neniam ne permesis ke oni tus'u min , ec' kiam la prezo egalus al ilia vivo. La pordoj de via malgranda lando estis c'iam malfermitaj, Albanio. Viaj autoritatuloj estas fermintaj ambau' okulojn kiam estis necese ofertante al la malric'aj kaj persekvitaj homoj plian s'ancon por transvivi la plej teruran militon de c'iuj tempoj.

Albanio, ni eltenis la sieg'on danke al via humaneco. Ni estas porc'iame dankemaj al vi."

Sed Irene Grunbaum ne estis la sola hebreo kiu transvivis la Duan Mondmiliton sur la tero de Albanio. Alie ol en la ceteraj landoj de la Orienta Eu'ropo, albanoj estis la sola nacio kiu estis preventinta la nazian persekvadon de hebreoj dum la jaroj de

Holokau'sto kaj la sola lando kie la hebreoj transvivintaj estis 100 %. Des pli, la patrio de albanoj estis la sola lando de Eu'ropo kie la nombro de hebreoj je la fino de la milito estis pli ol tiu en la komenco de la milito. La savig'o de hebreoj en Albanio farig'as pli eksterordinaraj'a aparte kiam oni komparas la sorton de ili en la najbaraj Grekio kaj Jugoslavio kaj kiam oni prikonsideras la fakton ke en ambau' menciitaj landoj , pli ol 85% de hebreoj log'intaj tie estis forsenditaj al kaj mortintaj en koncentrejoj.

## Kial okazis tiel en Albanio?

Tio povas eksplikati per kelkaj karakterizaj'oj de la albana popolo, inter kiuj jenas:
La longtempa kunvivado de ambau' etnoj, religia toleremo, manko preskau' absolute de antisemitismo, la morala kodo de albanoj- Kanuno.

**Kunvivado.**

Historio de kunvivado de albanoj kaj hebreoj komencig'as ekde du mil jaroj, c'irkau' la II kaj III jarcentoj antau' Kristo.

Tiam romia s'ipo (boato), plenplene de sklavaj hebreoj estis naviganta de la okupita Judeo al la bordoj de Romia Imperio. Pro malbontempo, g'i estis devigita ankrig'i sur la bordon de iama Ilirio, hodiau' Albanio. Profitokazante hebreoj eskapis el la s'ipo kaj disvastig'is tra la albanan marbordon. C'ar Romio tiutempe intermilitis kun Ilirio, la s'ipestroj pensante ke la sklavoj sammaniere perdig'us au' mang'ote de bestioj c'irkau'e, au' mortigote de iliroj, decidis ne postsekvi ilin sed reveni Judeon kaj replenigi la s'ipon per novaj sklavoj tie, ne riskante batali kun iliroj mem.

Tamen iliroj , malamikoj de romianoj, traktis hebreojn kiel kompantindulojn kaj helpis al ili vivteni per nutraj'oj kaj log'ado. Tio estas vers'ajne la unua ondo de hebreoj en la albanan teron.

Kvankam la informaj'oj estas malmultaj, lau' hebreo-romia kronikisto Falvius Josephus, en Albanio tiutempe evidentig'is almenau' 12 log'lokoj de hebreoj, kiuj lasis spurojn en la toponimojn ankorau' hodiau'. Tiel Palasa-Palestina, Orikum-Jericho, Foiniko-Phoinike kaj Galile estas nur kelkaj el lokoj en la albana marbordo de sudo kiuj konservis la fakton de hebreaj log'lokoj c'e ni. Tio signifas ke hebreoj estis libere permesataj log'i tie kaj integrig'i al la tiama socio.

Tamen pasis pli ol 1500 jaroj , kiam okazis la dua ondo de hebreaj rifug'intoj al Albanio. La flukso komencig'is en Selaniko (Grekio) c'irkau' XIV jarcento kaj finig'is je la fino de XV jarcento, per pli granda nombro de enmigrintoj alvenintaj el Hispanio kaj Portugalio pro inkvizicio.

La tria ondo venis de Janino kaj Prevezo (ambau' en la albana regiono de C'amerio, Grekio) en la jaroj 1850 kaj instalig'is c'efe en la marhavena urbo de Vlora. C'irkau' la jaro 1894, reprezentantoj de hebreoj en Rusio vizitis Albanion cele esplori la eblecojn por venigi c'i tien dekoj da hebreaj familioj el Rusio.

Laste, la kvara ondo de hebreoj okazis dum Holokau'sto, en la jaroj de la Dua Mondmilito.

Estas ja fakto ke dum dumil jaroj neniam okazis kverelo au' malamikeco inter albanoj kaj hebreoj kunvivantaj. Kontrau'e, en pluraj kazoj ambau' etnoj kunfrontig'is al la malfelic'oj unuig'inte.

Tiel dum la tempo de Skanderbeg (albana nacia heroo, 1403-1468) hebreaj simboloj spegulig'is ankau' en la vivmaniero de albanoj kaj ties estroj. Ekz. la kulto de pano, simila al tiu de manna, la kulto de sabato, la kulto de sakrifico (sinofero), la kulto de revivig'o (reveno en vivon de la morto) kaj la stelo de Davido en la heraldiko de

Skanderbeg estas nur kelkaj influaj'oj de tiu paca kaj amika kunvivado. Tio montras ke hebreoj neniam estis devigitaj en Albanio kas'i sian identecon , kaj due ili estas batalintaj kun albanoj kontrau' osmanojn.
Post kiam Albanio sendependig'is (je la jaro 1912), hebreoj soldatig'is en la albana armeo kie oni permesis al ili ekzerci ilian rajton celebri kaj g'ui religiajn festojn. Albanoj ne distingis hebreojn kiel fremdulojn sed ilin konsideris kiel kunlandanojn. Hebreoj parolis la albanan kaj kvankam emis log'i aparte, neniam sin apartigis disde de albanoj.

## Religia toleremo

Estas sciite ke albanoj havas diversajn ekleziojn sed nur unu "religion". Ili estas nacia kaj lingvistika grupo inkluzivanta katolikojn, muslimojn kaj ortodoksojn. Identeco de albanoj determinatas de ilia etneco, dum la eklezio estas konsiderata subprodukto de okupadoj fare de diversaj imperioj, sekve duaranga. La unua kredo de albanoj kiuj pratempe estis paganoj estis katolikismo. Post la jaro 395, kiam okazis la granda divido de Romia Imperio, la albanaj teritorioj apartenis al Bizanco. La linio de Teodoso pasis g'uste sur Albanion. Je la fino de XV jc Albanio okupig'is de osmanoj. Cent jaroj poste komencig'is konvertig'o de parto de albanoj al islamo, per diversaj motivoj: aldona imposto por nemuslimoj, perforto, allogo per potenco , ric'aj'oj, ktp. Kiel pragmatistojn, albanoj akceptis islamon sed multfoje enhejme praktis katolikismon. Tiel agis ankau' multaj hebreoj. Ekz. Harvey Sarner en sia libro "Rescue in Albania. One hundred percent of Jews in Albania Rescued from Holocaust" (Savig'o en Albanio. Cent percent de hebreoj en Albanio savig'is de Holoh'austo) skribas: "En muslima vilag'o log'antoj diras ke ili iam estis hebreoj, tial ili portas ankorau' hebreajn nomojn. Distingitaj familioj en la tuta Albanio pretendas tiel. Ankau' ortodoksaj familioj diras ke ili estas hebreoj. La aktuala prezidento de Albanio, Alfred Moisiu devenas de familio hebreo-albana el Kavaja konvertig'inta al ortodoksismo cirkau' XVI-XVII jarcentoj.
Tia duobla pozicio religia helpus al la kunlaboro inter albanoj kaj hebreoj .
La hebrea religio konsideratis ec' kvara religio en Albanio, lau' registrig'o de log'antaro en la jaro 1944 (krom muslima, katolika, ortodoksa). Do hebreoj konsideratis ne malplimulton, sed religian grupon. Protektante hebreojn dum la Dua Mondmilito albanoj protektis nature siajn kunlandanojn. La graveco kiun konsideris albanoj por la unueco de Dio kaj ne divergeco inter religioj eksplikas apartan religian toleremon de albanoj. Albanoj c'iam aprecis pli multe albanismon ol la religian kredon de siaj sampatrianoj.

## Manko de antisemitismo

Ne nur civila historia paco kaj religia toleremo povas ekspliki la mankon de antisemitismo en Albanio. Du aldonaj kialoj estas : la malgranda nombro de hebreojn enlande ( 1500-2000) kaj sufic'e alta malalfabetismo (85 %) inter la log'antaro. La unua kialo ebligis al hebreoj ne okulfrapi al la nazioj , la dua ekskludis la eblecon legi fremdan literaturon antisemitisman.
Tial Johanna Neumann, transvivinta en Albanio skribis en sia libro "Albanien-ein sicherer Zufluchtsort?" (Albanio-sekura lando por rifug'i?): Albanoj ne estis antisemitistoj kaj ne sciis ec' ion pri antisemitismo.
Sed oni devas substreki ke ankau' en orientaj landoj malalfabetismo estis sufic'e alta, sed ties elitoj arang'is kruelajn pogromojn kontrau' hebreojn en siajn landojn. En Albanio estis multaj kleraj homoj kiuj kontaktig'is kun nazioj sed ili ne farig'is antisemitistoj. Ekz. lau' Johanna Neumann ing. Pilku , albano, edzigita al germanino Charlotte log'igis

min. Albana policisto rekonis miajn gepatrojn kaj arestis ilin, sed familio Pilku faris plejeblon por liberigi ilin post kelkaj tagoj. Kiam alvenis germanoj en la jaro 1943, ni pasis en subteran agadon. La patro, kiu facile identigeblig'is kiel hebreon foriris al Kruja, dum la patrino kaj mi plurestis en familio de Pilku, kvazau' samfamilianoj de Charlotte.
La usona ambasadoro je deveno hebrea en Tirana , je la jaro 1930, Herman Bernstein, interkonsentite kun la reg'o Zog la Unua, faris multon por venigi en Albanion multaj hebreoj el Germanio kaj Austrio, certigante vizojn al ili en la albanaj konsulejoj kie ajn en Eu'ropo. En siaj leteroj li klasifikis Albanion kiel malpleja antisemitista lando enmonde. Lau' li, tio dedic'itas al fakto de ne ekzisto c'i tie de religiaj superstic'oj kaj malamo.
Sed kial albanoj pretis riski ec' ilian vivon por helpi al hebreoj? Tion ekslplikas la kvara motivo-kanuno.

## Kanuno

Kanuno estas resumo **sui generis** albana de la neskribaj leg'oj kiujn respektis albanoj ekde miljaroj. G'i estis la morkodo de albanoj almenau' g'is la jaro 1950. En la kanuno oni difinis ankau' la konduton al gasto kaj fremdulo. Gastamo estis devontaj'o numero unu , sanktaj'o, en la kanuno por c'iu albano. Lau' g'ia neno No. 602 : "La hejmo de albano estas hejmo de Dio kaj de gasto"; lau' neno 609: "Pano kaj salo kaj koro , fajro kaj brulligno kaj iom da litaj'oj devas certig'i c'iamtempe por la gasto je c'iu momento tage kaj nokte"; lau' neno 614: "enirinte la hejmon , oni deprenas la armilon de amiko"; lau' neno 615: "reteno de armilo estas a) signo de braveco kaj honoro, b) signo de gardado, c'ar dirante bonvenon li restos senhonteme kaj vi pretas protekti lin je kiu ajn dang'ero c) signo de sag'eco por si mem, c'ar preninte la armilon, tiam , je kazo de malbonintenco de amiko, li ne povas domag'i vin, malarmita.
Nocio de respondeco por la amiko en la hejmo inkluzivis ankau' gaston-rifug'inton en la lokon de gastiganto. Tia sinteno savis la vivon de plimulto de hebreoj fremdaj foririntaj al Albanio petante rifug'on. En aliaj landoj de Balkanio oni distingis lokajn, disde la fremdaj hebreoj. Esploristo Stephen Schvartz skribas ke hebreoj de Makedonio, perfiditaj kruele, estis enmanigitaj al nazioj fare de kolaboracionistaj au'toritatuloj bulgaraj. El 7762 hebreoj antau' la milito, 6982 au' 90 % mortig'is. Albanio estis escepto c'ar c'iuj hebreoj savig'is. Ec' la albanaj kolaboracionistoj respektis la kanunon. Lau' kanuno, en Albanio ne ekzistis fremduloj sed nur gastoj. Se albano denuncis hebreon au' ties rifug'ejon, li kaj tuta lia gento malhonorig'us. Almenau' iliaj hejmoj forbrulig'us kaj ili forpelig'us de la propra tero. Neno 644 diras : "se al iu tus'ig'as la gasto, kanuno lasas du vojojn: mortigo au' malhonorigo"; dum lau' neno 648: "perfidulo kiu domag'as la gaston, forpelig'as tutfamilie kaj senig'as je sangoveng'o - rajto".
Laste ni rememoru ke dum la Dua Mondmilito , post la kapitulaciig'o de Italio, somere 1943, germanoj tuj enirintaj Albanion, traserc'is kie ajn oficirojn kaj soldatojn italajn por mortpuni ilin pro "dezertig'o". Estis tiam 15 000 tiaj armeanoj italaj kiu savig'is de albanaj familioj dum la tuta restinta milittempo kaj reenpatriig'is postmilite, spite je fakto ke antau' 1943 ili estis okupintaj la landon kiel fas'istojn.
**Bardhyl Selimi**

## Poeziaj'oj

## La Husaro

C'ecalon striglis li kolere
Kaj grumblis li kun gala moko:
"Min la diablo portis, vere,
Al tiu c'i damnita loko!

Kiel en turka batalado,
Ni tiel ac'e stati devas.
C'iam nur supo en la plado,
Pri vino – ni jam ec' ne revas.

Malbona mastro kaj malbona
Mastrino per rigardoj pikas,
Nek bona vort' , nek skurg' ' admona
Virinon tie c'i sag'igas.

Hej , urbo Kiev! Kia lando!
En c'iu domo bonah vinoj,
Per si en bus'on falis frando,
Kaj kiaj tie la virinoj!

Vi sub okula sorc' , je Dio,
Por ili ne domag'us morti.
Malbona estas,hm, nur tio.."
-Nu, kio? Volu do raporti!-

Li fiere tordis la lipharojn:
"Do, vi ne estas ja stupviro,
Sed, frac'jo, mi – mi spertis farojn,
Pro kiuj vin frapegos miro.

Orelu nun. La garnizona
Restado estis c'e la Dnjepro.
Mastrinis min vidvino bona
(La edzon murdis ia febro).

Jam baldau' bone ni rilatis;
Dorlotis min Marusja bela.
Se mi kelkfoje s'in trabatis,
Toleris s'i sen vort' ribela.

Kiam mi estis tre ebria,
S'i enlitigis min kaj flegis.
Mi palpebrumis: "Perlo mia"
Neniam s'i kverele blekis.

NI tiel vivis en agrablo
Kaj vivus longe, sed konfuzis
Min io, eble la diablo,
Kaj mi subite ekj'aluzis.

Kial la baptanin' sin s'telas
El lito en la nokt' malfrua?
S'i, juna sango, kiel celas?
C'u al petolo rendevua?

Mi pensis, kaj observis vigle,
Kaj iunokte ne ekdormis.
Ekstere nokto kus'is nigre,
Kaj c'irkau' l'domo vento s'tormis.

Mi vidis: s'i movig'as lite,
Trapalpe mian dormon provas,
El lit' al forno pasas glite,
El arda karbo fajron blovas.

Kaj ekbruligas kandeleton,
Angulon iras piedpinte,
Poste , de tie boteleton
Kaj balailon elpreninte,

Nudigas sin la dolc'a pupo,
Eltrinkas, de l'botelo klukas
Tri glutoj- kaj tra l'kamentubo
Sur balailo s'i forflugas.

Do sorc'istin' vi estas, kara?
Mi pensis, kaj de l'lit' min pus'is.
Ni vidu! Jen- la sorc'ofara
Botel' en la angulo kus'is.

Mi flaris g'in- fi, g'i fetoris.
Mi vers'is el g'i al la planko.
Miraklo! Hip hop! Forkamforis
La forna fork'p kaj forna stango.

Sur benko , tie kato sidis,
Mi g'in aspergis per la sorc'o.
Gi ternis. Hus'! G'i postrapidis
La forkon tuj tra l'forna gorg'o.

Mi nun aspergis per la fec'o

C’i tien, tuen, dise, blinde.
Jen : poto, tablo, benko, seg’o
Tuj malaperis forfluginte.

Diablon! Kurag’ul’ ne cedas!
Husar’ , gustumu c’i mielon!
Mi glutis c’iom. C’u vi kredas,
C’u ne- mi flugis en c’ielon.

Mi flugas, kien- mem ne scias,
Mi tranc’e sagas tra l’aero,
Al stel’ renkonta “dekstren”!” krias,
Pum! Fine falas al la tero.

Jen monto. C’irkau’ kaseroloj
Amaso ludas, ege kric’as
Inter voluptaj fipetoloj.
Kun rano dance jud’ parig’as.

Mi krac’as, preta por ekklac’o..
Alflirtas jen Marusja krie:
“He! Hejmen! Oni vin, bubac’o,
Formang’os tuj! For de c’i tie!”

“C’u min timigi? Hejmen? Bone?
Sed kiavoje?? Jen , eksidu
Sur forna stango! Rajdu do, ne
Gapadu, malbenit’, rapidu!

“Husar’ sur forna stang’ ?Absurdo
C’u tiel do vi min estimas?
Vi frenezig’is, mia turto!
La senhau’tigon vi ne timas?

C’evalon! “Jen g’i, idioto!”
Kaj vere ja, c’evalo bela
Aperis nun en fajra troto:
C’evalo danckrura kaj silkfela.

Mi do tuj husarmaniere,
Hip hop, sur g’ian dorson saltis.
Brid’ mankis. Manku! Traaere
Ni flugis kaj- c’e l’forno haltis.

En sama stat’ mi c’ion vidis.
Forestis la c’eval’ ; rajdpoze,

Firmtene mi mem kruce sidis
Sur – benko. C’u ne kurioze?”

Li fiere tordis la lipharojn:
“Nu, vi ne estas ja stupviro,
Sed frac’jo, mi- mi spertis farojn,
Pro kiuj vin frapegos miro.”

**El la rusa trad. K. Kalocsay**
**(c’erpita el”La Nica Literatura Revuo” n-ro 2 decembro 1956)**

**EIPHNH, PAX, S’ALOM’**
C’asbirdojn tentas supernuba
Flug’ ; jaguarojn rapidrevo:
Nur homojn logas mondokrevo
Inkuba.

Delonge tial strebas oni
C’itere al sen-murda grundo
Por pace pri felic’abundo
Disponi.

EIPHNH : ho la idealo!
For la militojn ! For de l’mondo!
Regu denun  en nia rondo
Neu’tralo!

Sed hantas timo pri atakoj:
Do: vetarmadi, - resti fortaj,-
Sin s’irmi c’iel per kohortaj
Barakoj…

Au’ PAX : romia paco-speco:
Kie minacas malamiko,
Atak’ :teroras en praktiko
Forteco.

“Preparu, se vi volas pace
Vivi , militojn!” – Kaj okupu
Ja c’ion: homo homon lupu
Au’dace!

Sed Teron ni heredis de la
Generacioj nin antau’aj
Por lasi g’in al la morgau’aj
Juvela…

Do revas ni okulaperte:
Venu S'ALOM' en plena senco,
Konstruu ni kun pacienco
Kaj lerte.

C'i mondon, sed inversigita!
C'esu malgaj' de kiu ploras:
Larmfrapojn onte ni titolas
Granitaj!

Por senhejmuloj jen tegmenton,
Putojn konstrui en dezerto,
Lacig'i ec' ne pro fi-sperto
Momenton:

Ekhaltu fine fug'antfluo,
C'ies c'agrenon ni forkisos,
Nenies larmojn plu publicos
Revuo

Ho glora celo: Sankta Paco!
Home vivadi sur c'i Tero:
Estu Justeco kaj Libero
Kompaso!

**Gerrit Berveling**
**(C'erpita el "Poemaro por Paco", 1986)**

**Religiaj kredoj en Albanio-fragmento el la diplomlaboraj'o**

**1. Kristanismo c'e albanoj**

Religio estas ludinta unurangan rolon por la transvivo de la albana nacio samskale kiel por aliaj popoloj pratempaj kiel armenoj kaj hebreoj. Estis ja kristanismo tiu kiu donis pli fortan identecon al la albana popolo dumtempe de barbaraj kaj osmanaj alvenegoj , transformig'inte en sanktan landon dum la tempo de Skanderbeg, c'ar tiu lasta estas protektinta Krsitanismon en la tempo (XV jarcento) kiam Papo kaj Patriarh'o kverelig'is inter si. Estis la islama religio kaj bektas'iismo kiu diferencigis albanojn tiam kiam la slaviginta kaj heleniginta politiko de najbaroj celis la asimilon kaj profiton de albanaj teritorioj. La morala komuna flamo por albana eklezio de c'iuj kredoj estis tio de apostoleca diligenteco pratempa interplektita per arda patriotisma sento.

En Albanio kristanismo estas apostoleca, tio estas g'i estas enkondukita c'e arberoj rekte per la bus'o de apostuloj de Jezu Kristo kaj komencig'is disvastig'i en Ilirion ekde I jarcento post Kristo kiel malleg'an religion. Apostulo Pau'lo c'irkau' la jaro 57 skribas : Tiel el Jeruzalemo kaj c'irkau'e g'is al Ilirio mi estas servinta por revivigo de Kristo, klopodante evangelizi tie kie la nomo de Kristo estis nekonata ..

En la jaro 58 lau' dokumentoj en Durres estis 60 kristanaj familioj. En la jaro 70 ekdej'oras sian laboron la episkopo Cezar en Durres, en la jaro 98 Sankta Astin, estis kondamnita al morto en la jaro 116 de imperiestro Trajan de la loka reganto Agrikoli, kiel malleg'ulon.
Unuaj kristanaj centroj krom Durres, notatas Butrint, Onhejzmo, Jeriko, Vlora, Apolonio, Amantia, Bylis, Antipatrea, Skampis, Scodra, Albanopolis, Lyhnid ka. La ilira imperiestro Kostandino proklamis Kristanismon oficialan religion en IV jarcento kaj konstruis multajn bazilikojn. Sankta Jeronimo, ilirdevena, tradukis Biblion en la latinan (La Vulgato) je mezo de IV jarcento. La plena konvertig'o al kristanismo en iliraj teroj finig'is en V-VI jarcentoj. La unua ekumena koncilio de Nikeo en la jaro 325 estis la unua formulinta la bazan principon de kristanismo: mi kredas je Dio, c'iupotencan patron, kreinton de Universo kaj Tero kaj de c'iuj videblaj kaj nevideblaj objektoj.
Sankta Niketa de Dardanio (Remesianes) estas la kreinto de la c'efpreg'o de kristanismo ( C'efhimno) Te Deum Laudamus ( Vin Dio ni lau'das) dau'ranta esti c'efpreg'on ankorau' hodiau' post 15 jarcentoj.

**Disvastig'o de kristanismo en Albanion**

Kristanismo ekis per la nasko de Jezu Kristo en okupita Palestino de Romio. Li proklamis sin la Savanton kaj longe atendatan Mesion.
Albanio estas difinita kiel unu el mediteraneaj landoj, kien la kristanismo penetris ekde la unuaj jarcentoj. G'i starig'is en Albanio sur apostolecaj bazoj. La kristana evangelio enkondukig'is unuafoje en Eu'ropo de apostolo Pau'lo en Filipe de Makedonio (jaro 41). Poste vojag'ante al Okcidento, tra la vojo Egnatia, li prediktis en Selaniko, la plej granda urbo tiutempe. Pli malfrue, tiu urbo farig'is centro de kie kristanismo radiis en Atenon kaj Korinton, samkiel en la provincon de Iliriko. Estas interesa la fakto ke la vojag'oj de Pau'lo sekvis fidelece la vojon Egnatia , de Selaniko je direkto de Okcidento penetrante en la koron de Albanio c'irkau' 270 km kaj starigis dumvoje la unuajn kristanajn komunumojn.
Au'toro de la VI jarcento, Kosmas, inkluzivas iliro-albanojn en la grupo de popoloj kiuj siatempe estis c'irkau'brakintaj kristanismon. Durres, Nikopojo estis la c'efaj centroj marbordaj, de kie la nova religio disvastig'is poste en la profundon de la kvar provincoj iliraj: Prevalo, Dardanio, Nova Epiro kaj malnova Epiro. Ekde la unuaj jarcentoj de nova erao, en la urbaj centroj de tiuj regionoj menciatas la unuaj kristanaj komunumoj, samkiel starig'as la unuaj domoj de nova kulto. En Durres, ekzemple, lau' romia historiisto Farlati, en la jaro 58 estis 70 familioj kristanaj..
Alia historiisto, Lavardini, skribante pri la praeco de familio Dukagjini , en la montoj de nordo, mencias ke " en la interno de tiu regiono oni povas vidi monumentojn el mramoro, sur kiuj ankorau' ( jaro 1576) oni legas la nomojn de multaj romiaj imperiestroj ka inter tiuj kelkaj esprimaj'oj au' atestaj'oj, montrantaj klare ke la apostulo Pau'lo estas prediktinta al la popolo La Leg'on de la Filo de Dio (jaro 45).
Greka historiisto, Menalogu, mencias martiriig'on de Sankta Astin el Durres (jaro 98-117 post Kristo) kaj Floriano kaj Lau'ri el Ulpiana apud hodiau'a Pris'tino . (jaroj 117-138 post Kristo).
La elito de iliraj gardistoj probable estas au'skultinte apostulon Pau'lo dum lia memdefendo brila kiam oni arestis lin en Jeruzalemo (jaro 49) kaj dum lia enprizonig'ado longa en "preatoriumo" en C'ezareo. Kvankam la tradukoj prezentas Pau'lon fermitan en

la “jugeja korto” de Herodo au’ en “lia palaco”, la greka teksto precizigas ke li tenig’is fermita en “preatoriumo de Herodo”. Poste, dum lia enprizonig’o en Romio, jaro 64 apostulo skribas ke “liaj kristanaj fratoj c’eestis en la tuta palaco” sed la greka teksto denove precizigas “en la tuta preatoriumo”. En la letero de Pau’lo adresita al lia asistanto, Titi, post liberig’o de unua enprizonig’o en Romio, li petas : ”venu al mi en Nikopojo (Suda Ilirio) c’ar tie mi pasigos la vintron.
Tiaj domoj, bazilikoj kaj baptejoj (baptistero) de IV-VI jarcentoj konservig’as ankorau’ hodiau’ parte en la distriktoj de Durres, Shkoder, Lezhe, Mat, Apolonio, Elbasan, Diber, Ohrid, Tirane, Vlore, Gjirokaster, Sarande, Butrint kaj ankorau’ pli sude
La praecon de la albana kristanismo pruvas same vico da loknomoj kiuj referig’as al la unuaj martiroj de Oriento, kies kulto estis disvastigata en IV-VI jarcentoj. Tiaj estas toponimoj Shirgj ( Sankta Gjergj), Shubak (Sankta Baku), Shendekla ( Sankta Tekla), Shen Vlash renkontataj en Shkoder, Durres, Himare, kaj g’is malsupre en C’amerio (Shen Vlash, Shen Tekla). Konjektitaj kun la kulto de martiroj envorte samkiel kun la praa historio de kristanismo, estas tiaj toponimoj luitaj el la landoj de Oriento kiel Rozafe (loko en Sirio, kie estis entombigita Sankta Baku kaj Sankta Gjergj), Barbullush (Barbalista, loko c’eborde de Eufrat, kie estis murdita Sankta Baku), Sebaste, Jeriko.
La grandaj persekvadoj kontrau’ kristanojn registris ankau’ en Albanio multajn martirojn, kies kulto konservig’is dum jarcentoj. Pli distingitaj inter tiuj martiroj estas Sankta Asti, episkopo de Durres, Sankta Terini el Butrint, Sankta Donati, episkopo de Evrojo (Paramithi), Lau’ro kaj Flau’ro el Dardanio ka. Samtempe, en la toponimio de la lokoj enkondukig’as kristanaj nomoj je tipo Shengjin, Shupa (Sankta Pal), Shmill (Sankta Mehill), Shen Koll au’ Shen Nik ( Sankta Nikolle), Shemri (Sankta Marija), Shendell (Sankta Ilia), Shen Gjergj, Shtish-Shen matish (Sankta Mateu), Shingjon, Shegjun (Sankta Gjon), Shen Ndreu ka. C’iuj c’i nomoj , kiuj en Balkanio en tia maso kaj tia disvasteco trovig’as nur en la albanaj teroj , konjektig’as kiel ajn kun periodo antau’ la instalig’o de slavoj en VI-VII jarcentoj. Ilia disvastig’o kiom en la marbordaj lokoj tiom en la profundaj montaraj areoj for de la marbordo, estas plia donitaj’o pruvanta ke tiuj spacoj restas esence ne tus’itaj de paganaj slavaj instalig’oj kaj ke post la slavaj alvenegoj de VI-VII jarcentoj la au’toktona loka log’antaro, konservig’is netus’ita en la plejparto de Suda Ilirio.
Sendepende de klopodoj por sufokigi la novan religion, kristanismo estis konfirmita en Albanio definitive. Post grandaj persekvadoj de IV jarcento la historiaj fontoj parolas pri eklezia strukturo sufic’e solidigitan. G’i estis organizita surbaze de administraj provincoj de epoko de Diokleciano. En la centro de c’iu provinco trovig’is metropolitana preg’ejo kaj tie sidejis la c’efepiskopo. Sub la juridikcion de tiu lasta trovig’is la episkopoj de dependantaj diocezoj (sufraganoj). Tiel, en kvar c’efaj ekleziaj centroj en la albanaj teroj estis c’efepiskopejoj de Shkoder (Prevalo), Justiniana Prima (Dardanio), Durres (Nova Epiro), Nikopojo (Malnova Epiro).
Kun la disvastig’o de kristanismo en la internajn regionojn, la nombro de episkopejoj c’iam pli kreskis. Je vidpunkto de g’enerala eklezia organizig’o , la albana eklezio dependis de Papo de Romo, kiu ekzercis sian au’toritatecon per la anstatau’anto en Selaniko. Dum la kunfrontig’ado de Romo kun Kostandinopojo (484- 519) la albanaj episkopoj konfirmis sian fidelecon al Romo. (aparte la klerularo de provincoj de Dardanio, Prevalo kaj Nova Epiro). La imperiestro Anastaso I deveninta el Durres influis

por plifortigi la rilatojn de metropolitejo de Durres kun Patriarh'ejo de Kostandinopojo. Sed la alia imperiestro Justiniano, denove ilira, rekonis la juridikcion de Romo.
Je konkludo de la alvenegoj de popoloj en VI-X jarcentoj vico da episkopejaj centroj ne plu menciatas ( Onhezmo, Skampa, Amantia) kaj aperas aliaj ( Cernik, Deja, Kruja, Himara, Devolli, Kolonja, Dibra). Dum la tempo de bulgara regado la metropolitena sidejo de Nikopojo ( Malnova Epiro) translokig'is pli suden, en Naupakt, tiu de Dardanio de Shkup al Ohrid, dum tiu de Preval de Shkoder al Tivar.
Sed la plej granda evento enkadre de la eklezia organizig'o de la albanaj teroj estis la decido de la jaro 732 de bizanca imperiestro ikonoklasta Leoni III por senigi la albanajn episkopejojn je dependeco de Romo kaj transpasigi ilin sub la juridikcion de Patriarh'o de Kostandinopojo.

### 1.1. Kristanismo dum la bizanca periodo (alternativa opinio de Aristidhe Kolja)

En la periodo de tiel nomata Bizanca Imperio, iliroj, sed ankau' grekoj trovig'as antau' problemo, renkontata unuafoje. Ili kunfrontig'as la problemon de enkondukado de kristana religio per c'iuj rimedoj, el la plej facilaj g'is la plej barbaraj. C'ar ambau' tiuj popoloj havis kiel adorsistemon , certan ideologion, miljaran , kontraustarig'inta al la nova religio. La Granda Kostandino kiu entrudis tiun religion karakterizig'as de iliro severa kaj tolerema al la ceteraj religioj. Estas klare ke li ne kredis je iu religio, nek je kristanismo. En la lastaj momentoj de lia vivo , kiam li ne plu kontroladis siajn agojn, li baptis sin au' pli bone, baptig'is. Sed li posedis menson de politikisto. Li estis imperiestro kune kun tri aliaj. Komence li devis kvitig'i kun la tria imperiestro, Maksento. Maksento havis antau'ecan pozicion. Li posedis Romon, havis grandajn fortojn kaj c'iuj faktoj montris ke li estig'us la sola estonta imperiestro. Sed Kostandino malkovris nekompareblan alianculon: kristanojn de imperio. Li invitis ilin kunlukti kun li , sed la kristanoj nur militon ne faris. Des pli sangovers'i por la interesoj de du imperiestroj, kiu ne adoris nur unu Dion, sed plurajn. Tiel estis malkovrita la imag'o de Kruco kun "tiu c'i venkos". Mi diras, estas malkovrita, c'ar mi ne volas ofendi la eklezian kredon de multaj grekoj, sed mi kredas ke se ili pripensig'as bone , Kostandino, se li estus vidinta envere la imag'on, c'u li ne tuj farig'is kristana? Sed li ne farig'is iam tia, nur kiam li kus'is en la morta lito "farig'is"tia. Sed li estis envere tolerema al la aliaj religioj. Kiel iliro-arbres'on ki konservis siajn religiajn sentojn kaj kiel bonan politikiston, la titolon de c'efepiskopo de kristanoj same la titolon de Pontefikso de adorado de Suno.
Antau' tio li translokigis la c'efurbon de imperio al Bizanco, ne nur dominanta sur Orienton kaj Okcidenton, sed apudhavas ankau' la originojn de liaj alianculoj, kristanojn. Tie, post la morto de Kostandino, dominantis kristanoj kaj establis kristanismon per manieroj kiujn multaj bone jam scias. Mi volas diri ke multaj grekoj ne konas la kondic'ojn, sub kiuj oni entrudis la kristanan religion en Grekion kiu pereigis el la tersurfaco c'ion rememoranta la neripeteblan civilizon de klasika praeco.
La fanatigitaj imperiestroj kaj la j'us kreitaj amasoj de monah'oj estis decidemaj "savigi" la spiriton de grekoj. Ili komencis faligi la altarojn kaj templojn, por ke oni ne povu okazigi la solenaj'ojn de adorado, fare de grekoj. Dau'ris poste la malhelpado por ke grekoj ne eniru al siaj temploj. Komencig'is la persekvado de lernejoj kaj akademioj. Alvenis poste ankau' Granda Teodoso kaj komencig'is la ekzekutoj pogrupe de c'iuj tiuj kiuj ne akceptis kristanismon. En la stadiono de Kavalla li mortigis 50 000 grekojn kaj

romianojn. Li malpermesis la okazigon de Olimpiaj Ludoj kiu g'is tiam estig'is pretekste ke ili plifortigis la praan religion. Li faligis la plej belajn templojn, c'efverkojn de la arto neripetebla praa helena.
Tiuj c'i obskuruloj rompis la kapojn de la statuoj kaj j'etis ilin en la maron. Ankorau' hodiau' ni vidas tiujn c'i restaj'ojn de arto unika, sen kapoj, sen manoj kaj sen piedoj, kiuj aspektas tiom belaj kaj tiom vivaj. Oni fandigis la blankajn mramorojn de la temploj kaj de la statuoj kaj transformis ilin en kalkon por konstrui preg'ejojn kaj kirkojn au' rompis ilin por ke ilin uzu kiel s'tonojn por la preg'ejoj kaj kontrau'artismaj monah'ejoj. Ili faligis la templojn kaj sur kies ruinaj'oj starigis la preg'ejojn je manio veng'ema. Atestaj'ojn estas la kolonoj kaj basoreliefaj mramoroj en la malnovaj kristanaj preg'ejoj en la tuta Grekio. En c'iu kristana preg'ejo oni povas vidi pecojn de mramoro kaj rompitajn kolonojn. Vi vidos trupojn de statuoj kiujn kristanaj orientuloj alvenintaj en Grekion por entrudi al la popolo la novan religion tiamaniere, faris el tiuj s'tonojn por konstrui siajn preg'ejojn.
Tio dau'ris tri jarcentoj. Poste, kiam oni faris la grekan oficiala lingvo de Bizanco, restartis la intereso por la helena kulturo, ekestis ankau' grekaj imperiestroj.
Neniu povas diri ke Kostandino celis ion tian. Kontrau'e li klopodis establi la spiriton de toleremo inter religioj kaj flankenlasi fanatismojn kaj religiajn interluktojn, cele ke lia s'tato ne trafig'u de detranc'ajoj je tia naturo. Tial kiam komencig'is la unuaj herezioj de kristanoj, li malpermesis tion intervenante persone en iliaj aferoj.

### 1.2. Albanio inter Oriento kaj Okcidento

Trovig'anta inter du rivalaj gigantoj, Romo kaj Kostandinopojo, Iliriko farig'is kverelpomo. G'ia vasaleco foje de unu flanko foje de la alia, kau'zis longan malamikecon inter Kostandinopojo kaj Romo, kiel viktimon de iliaj sennombraj intrigoj. Parte kulpulo pro tio estis la sinfonia interrilatig'o kreita de Kostandino inter Eklezio kaj S'tato (li rekonis la au'tonomecon de Eklezio, akceptante ties definitivan au'toritatecon en la afero de doktrinoj, dum s'tato devis protekti Eklezion kaj gardi uniformecon). Sed maltau'ga estis la nekonvena divido de Iliriko. Tiel la provincoj de Makedonio, Tesalio, Epiro, Helaso, Kreto, Prevalo ( de Dalmatio suden g'is Epiro) konsistigis diocezon de Makedonio, kiu kune kun nordorienta diocezo de Dakio, formis prefektejon de Iliriko. Nordokcidentaj provincoj inter Dalmatio kaj Danubo formis diocezon de Iliriko sub prefektejon de Italio. Dum la diocezo orientbalkana de Trako , enmetig'is sub prefektejon de Oriento. Lau' tiu ne prudenta organizeco , parto de la malnova romia Iliriko alig'is al Romo, la cetero al Kostandinopojo, dum la regionoj inter ili restis "prado de rab-bestioj".Des pli por pliprofundigi la malfelic'on, la sinfonia interrilatig'o de Kostandino inter Eklezio kaj S'tato difinis la eklezian organizecon surbaze de politika organizeco. Sekve, la politikaj balancig'oj respegulig'us ankau' en ekleziajn organojn. Kaj tiaj estig'us sufic'e de ambau' flankoj. La ekleziaj gvidantoj en la grandaj centroj g'uis eklezian au'toritatecon sur la ekleziaj regionaj gvidantoj, same kiel la civilaj au'toritatuloj sur tiuj regionaj . La episkopoj de Kostandinopojo, Romo, Antiokio, Jeruzalemo kaj Aleksandrio kverelig'is inter si por supereco , same kiel iliaj politikaj homologoj.
Dum la periodo je tumultoj, post Kostandino, Teodoso nomata "Granda" farig'is imperiestro de prefektejo de Oriento. Pro geografiaj kaj strategiaj kialoj, ambau' diocezoj plej grandaj, de Makedonio kaj Dakio, konsistigintaj prefektejon de Iliriko, alig'is provizore al la posedaj'oj de orienta imperio. Post la morto de Teodoso, la romia

imperio dividig'is definitive inter du liaj filoj Honoro kaj Arkado, kiuj regis respektive en Okcidenta kaj Orienta Imperioj.

**La eklezia stato en albanaj teroj**

Alie ol la aliaj popoloj najbaraj balkanaj, albanoj ne havis solan nacian eklezion. La albana teritorio trovig'is sur la limlinio inter du universalaj eklezioj de la tempo, tiu katolika kun sidejo en Vatikano kaj tiu ortodoksa kun sidejo en Kostandinopojo.

Tiu linio, estis proksimume la linio Durres-Elbasan- Diber- Shkup. Ambau' universalaj eklezioj trovig'is en eterna rivaleco. Aparte embarase trovig'is katolikoj c'ar Papo de Romo helpis la batalantojn kontrau' Osmanan Imperion. La episkopejo de Tivar estis la c'efcentro de la albana katolika kristanismo ( Tivar, Shkoder, Lezhe, Sape au' Zadrime, Pult, Prizeren-Shkup). Sude estis episkopejo de Durres (Durres- Kruje- Arberi- Elbasan-Tirane), Lis ( Mat), Bende ( Shengjergj) , Kunavi ( la areo Durres, Tirane, Peqin, Kavaje).

La katolika eklezio entreprenis certajn agojn por malhelpi la malfortig'on de sia influo en albanan log'antaron, reviglante la agadon de siaj misiistoj, refondante la franceskanajn misiojn, klopodante inkluzivi ene de la radio de g'ia agado ankau' regionojn je ortodoksa log'antaro ( kiel okazis kun regiono de Himara, kiu plurfoje demandis submetig'i al la juridikcio de Romo). Tiu unita movado trovis terenon plie c'e arberes'oj de Italio, formintaj plej grandan mason de ortodoksaj kredantoj je deveno el Suda Albanio kaj Meza Albanio, samkiel el la arberoraj instalig'oj de Grekio, inkluzivig'intaj sub la spiritan gvidantecon de Unita Eklezio, aparta strukturo de la Romia Katolika Eklezio.

La osmanaj okupantoj detruis vicon de preg'ejoj au' transformis ilin en moskeojn. Tian sorton havis ankau' la katedralo de Sankta Nikola , entombig-loko de Skanderbeg en Lezhe, episkopejo de Sankta Georgo en Tivar, g'ia sidejo en Tivar, preg'ejo de Sankta Marija de Neg'o en Lezhe, preg'ejo de Sinjorino Altigita en C'ielon en Prizereno (kune kun g'i forbrulig'is ankau' multaj malnovaj libroj , samkiel tre valora ikono). Multaj libroj forbrulig'is ankau' en la preg'ejo de Kruja.

Pro antiosmanaj ribelig'oj por eskapi raprezaliojn multaj katolikaj ekleziuloj forkuris. Frang Bardhi estis stariginta la taskon de starig'o de eklezia kolegio por pretigi lokajn prelatojn. Sed en XVII jarcento la esperoj por revivigi la katolikismon sin apogis de interkonsentoj kiujn Francio kaj Au'strio subskribis kun osmanoj por ke ili estu protektantoj de la katolika eklezio en Albanio. La rajton de "Kultus-Protektorat" Au'strio ekspluatus aparte dum XIX jarcento kiam komencig'is la pliakrig'o de interrilatoj osmanaj-rusaj.

Alie de katolika eklezio, la agado de ortodoksa eklezio en albanaj regionoj disvolvadis en pli favoraj kondic'oj. La Ekumena Patriarh'ejo de Kostandinopojo certigis bonajn interrilatig'ojn kun osmanaj regantoj kaj konservis statuson iel pli privilegia ene de la strukturoj de tiu imperio. Sultano Mehmet estis proklaminta sin protektanton de la Ortodoksa Eklezio kaj nomumis la novan kapon de Ekumena Patriarh'ejo, episkopon Genadios (tiel nomata Skolaris), distingitan ekleziulon kaj kontrau'staranton de la unuig'o de Orienta Eklezio kun tiu Okcidenta. La sultana dekreto per nomumo de nova ekumena patriarh'o garantis al tiu lasta kaj al tuta ortodoksa eklezia hierarh'io sub ties dependeco, ka konservon de privilegioj kiujn ili g'uis en Bizanca Imperio. Al Patriarh'ejo kaj ties dependantaj strukturoj oni agnoskis la rajton de plena administrado de la spirita

kaj eklezia vivo de ortodoksaj kreduloj. Des pli, patriarh'ejo de Istanbulo akirantis vastan civilan s'tatpotencon. G'i posedis sufic'e multajn kompetentecojn por pritrakti kaj pridecidi por aferoj naskig'antaj inter ortodoksaj civitanoj de imperio. La ortodoksa eklezia jug'ejo povis decidi pri monpunoj, povis enprizonigi kulpulojn, ec' doni la kapitalan kondamnon. Pro tio al la Patriarh'ejo estis rezervita ankau' aparta prizono. La ekleziaj lokaj kaj centraj jug'ejoj havis same ekskluzivaj atribuoj por priesplori kaj decidi pri aferoj konjektitaj al la familia rajto ( geedzig'oj, divorcig'oj , ktp).
Alia aspekto estis ankau' la fiskaj privilegioj. La s'tatpotenco agnoskis la rajton al ekleziaj autoritatuloj ekposedi ric'aj'ojn, kolekti impostojn de kreduloj. En Balkanio ekzistis ankau' du potencaj ekleziaj organizaj'oj, kiel tiu de Ohrid kaj tiu de Peja. Tiel la albana log'antaro estis disdividita po tri partoj. Tiutempe ni vidas la starig'on de vico de monah'ejoj kiel tiu de Ardenica en Myzeqe kaj alia en Apolonio, monah'ejo de Sankta Kosma en Halikondas ( Myzeqe) ka. En XVIII jarcento  sultano estis supriminta la ekleziajn organizaj'ojn de Ohrid kaj Peja timigita de la influo de Rusio kiel protektanton de ortodoksaj kreduloj en Balkanio.

### 4.3. La Eklezio de Arberi en XII-XIII jarcentoj. Skanderbeg-unito

Sude de la fluo de rivero Drin komencig'is la limoj de Princlando de Arberi. Samkiel en la nordaj albanaj regionoj ankau' lau'longe de Princlando de Arberi, la disvastig'o de katolika rito kondic'itis ege pro politikaj cirkonstancoj kreitaj c'i tie post la  mezo de XII jarcento kiuj rilatig'as kun la g'enerala krizo de Bizanca Imperio kaj skuig'o de pozicioj de la s'tato kaj bizanca eklezio en Albanio. Ne ekskludig'as c'i tie la influoj alvenantaj de Durres. La prezenco de italaj komercaj kolonioj, kiel tiuj de venecianoj kaj amalfitanoj, subkomprenis ankau' la prezencon de apartaj preg'ejoj, c'irkau' kiuj arig'is kaj organizig'is tiuj fremdaj komunumoj. Sed aliflanke, la s'ang'ig'o de eklezia orienteco en tiu regiono estis esprimaj'o de s'ang'ig'o de politika orienteco de aristokrataro de Arberi kiu post XII jarcento ricevas klarajn nuancojn favoraj al okcidento.
La influo de katolikismo en la regiono de Arberi kondukig'is do tra la preg'ejo de Dioklea ( Genta) norde kaj tra katolika preg'ejo de Durres okcidente. Sed en Arber ekzistis ekde malnovaj tempoj nombro de abatejoj de Ordeno Benedikto fonditaj de okcidentaj misiistoj. Kvankam subombre tiuj dau're funkciis ankau' post  la skismo en la jaro 1054, tenante viva la romian orientecon (katolikan ) sian kaj servante kiel apogpunkton de Papo en tiuj regionoj. Tiaj monah'ejoj estis ekzemple monah'ejo de Shen Llesh en la malsupra enfluo  de Mat, monah'ejo de Shen Pau'lo en Blinisht, de Shen Meri de Nderfan c'eborde de Fani i Madh, monah'ejo de Shen Llesh en Orosh, de Shen Koll en Breg-Mate, de Shenepremte en Kurbin kaj laste, monah'ejo de Shelbuem en Rubik. Ilian praecon atestas tavoloj el mozaikaj'o, afreskoj au' surskriboj de muroj.
Estas eksterdube ke la movadoj de eklezio de Arberi difinitis plejparte de la politika volo de kapoj de Arberi. La nova orienteco de eklezio de Arberi al la  katolika Romo samkiel ties organizig'o sendependa de najbaraj centroj respondis al la nova direkto favore al okcidento kaj au'tonomema de ilia politiko.
La lasta akto estis la forlaso de ortodoksa rito kaj konvertig'o en katolikismon de mem kapoj de princlando de Arberi. Tio okazis en la jaro 1208 de princo Dhimiter.
Kvankam tiuj c'i negocioj kun Romo interruptig'is pro aliaj okazintaj'oj de la tempo, la katolikaj emoj restis c'iam potencaj kiel en Arberio tiel en Durres.

Ankau' Skanderbeg, estas sciite, estis kristano unita tio estas ema por unuig'o de ambau' bizancaj kaj romiaj eklezioj en unu solan. Tion ne pardoneblis al li la patriarh'oj de Kostandinopoja.

**Kristalig'o de ortodokseco en Albanio**

Alie ol en la aliaj albanaj regionoj norde la la linio Durres-Ohrid, en siaj teritorioj en sudo la krizo de Bizanca Imperio en XII jarcento kaj g'ia falo je 1204 pro krucanoj ne estas skuinta la poziciojn de la bizanca eklezio. Dum pli ol duonjarcento post la falo de Kostandinopojo, la tuta spaco de Durres al Prevezo, inkluzivig'is en la limojn de Despotato de Epiro, formacio kiu , je s'tata kaj eklezia vidpunkto, estis ia imitaj'o de Bizanca Imperio. Sub la tutelon de despotoj de Epiro , episkopejoj de Durres, Ohrid, Kanina, Berat, Devill, Drinopoja, Himara, Butrint, Euroja ekkonis periodon de aparta florig'o. Post la jaro 1260 , la plejparto de tiuj c'i regionoj inkluzivig'is dum preskau' unu plia jarcento (g'is 1346) enkadre de j'us rekonstruita Bizanca Imperio, kio influis ankorau' pli en la plifortig'o de ortodokseca karaktero de la kredo en ili. La politikaj cirkonstancoj ofte kau'zis ke la nobelaj familioj Matrenga, Muzaka, Zenebishi, Spata, Losha ekhavu interrilatojn kun katolikaj potencoj kiel anj'uinoj de Napolo au' Venecio , ec' ankau' kun la Papo mem. Rezulte okazis ke, je vidpunkto, eklezia iuj el liaj idoj konvertig'is en katolikon. Dokumento el la jaro 1290 donas g'uste la nomojn de grupo de "neofitoj" katolikaj apartenantaj al la menciitaj familioj. Sendepende de tiaj epizodoj, la sudaj albanaj regionoj kaj ties log'antoj restis g'enerale ligitaj kun ortodoksa rito.

## 1.3. Albana kristanismo kaj la pentroarto

**La**u' la sciulo Milan S'uflai, Durres kaj Salona estis du el la plej grandaj nestoj de kristanismo en Balkana Duoninsulo. Dum la ekspedicioj en Karaburun albanaj arkeologoj estas trovintaj kelkaj el la plej praaj atestaj'oj de kristanismo gravuritaj sur s'tono. Unu el ili havas formon de amforo, granda ujo kun du teniloj gravurita sur ebena kaj vertikala el s'tono en la Golfo de Gramata sude de Karaburuno. Tiu amforo reprezentas motivon de ang'eloj de subjekto de Geedzig'o en Kano, kiam Kristo faris la miraklan riton de transformig'o de akvo en vinon. Same sur la orienta flanko de Karaburuno , en iu el ties s'tonminejoj estas trovitaj gravuritaj du homaj vizag'oj de viro kaj virino unu apud la alia . Tiuj reprezentas vers'ajne la plej praan ikonografion de kristanismo en Eu'ropo kaj konkrete en la figuron de viro estas la vizag'o de Kristo, dum en tiu de virino estas vizag'o de Eklezio, lau' teologia koncepto de Mistika Geedzig'o. La atestaj'o de amforo kaj tiu de ikonografio probale estas la plej malnovaj de primitiva ikonografio kristana en eu'ropa kontinento.

Poste, en aliaj malkovraj'oj ni vidas elvolvig'i la kristana ikonografio per simbolismo de paganaj diinoj, konkrete Kristo prezentig'as je formo de diino Suno de Helios au' ankau' de la vizag'o de Orfeo. Ambau' tiuj realigaj'oj estas trovitaj en la urbo de Durres. Kristo g'is V jarcento estas prezentita ankau' per la figuro de Apolono. Post tiu tempolimo ikonografio de Kristo ricevas klasikajn ecojn, jupiterajn , de potenca viro kun barbo. La atestaj'oj de Karaburuno kaj Durres apartenas al II-III jarcentoj post Kristo.

La mozaikaj'o trovita en Arapaj, apud Durres, mozaikaj'o de Bizanca preg'ejeto en amfiteatro de Durres, mozaikaj'oj kaj ronda Baptistero de Butrint , tiuj de bazilikoj de Bylis samkiel de Lin, entenas c'efe scenojn c'efe de pastoralaj medioj de la nova venkanta religio de albana kristanismo.

En VI-XII jarcentoj disvolvig'as la arto de miniaturoj de kodikoj kaj la arto de afreskoj. En XIV jarcento lumig'as mezepoka kaj eklezia ikonografio je stilo paleologa, aparte en la arto de afreskoj de tablaro de preg'ejo de Shem Meri en Apolonio. Artisto au' grupo de artistoj realiginta tiujn afreskojn estas karakterizita de granda talento en pentroarto kaj grandaj vizioj humanaj por kristanismo. En XVI jarcento ekbrilas la plej granda albana ikonografo de c'iuj tempoj, Onufri, kreinta memstaran skolon en la historio de la monda arto. En XVIII jarcento ekbrilas same du grandaj geniuloj de albana ikonografio, David Selenica el Vlora kaj Kostandin Shpataraku el Elbasan.
Kromalie menciendas ankau' la kampo de ilustraj'oj de libroj per gravuraj'oj. Ekzemple estas 11 literoj gravuritaj c'e la libro de Gjon Buzuku en 1555 jaro. Samtiel, okazis kun la libroj de Pjeter Budi, Pjeter Bogdani kaj Frang Bardhi. Subjektoj de tiuj ilustraj'oj estas c'efe ikonografiaj, sed ili havas ankau' laikajn motivojn je granda graveco, ec' heraldikajn temojn rilatig'intaj al albanoj. En Nacia Historia Muzeo en Tirane estas eksponitaj kodikoj el XV jarcento entenantaj evangelion de Sankta Marko kaj Sankta Luka. Ili havas du gravuraj'ojn montrantaj evangeliajn verkistojn , Luka kaj Marko, je formo de sciuloj, sidantaj c'irkau' la skribotablo kaj skribante evangeliojn. Tiel ekz. Luka sidas kaj skribas per la dekstra mano, dum kun la maldekstra mano tenas la skribilojn de tiu tempo. Antau' li estas la muro kaj malfermita fenestro. Ambau' tiuj gravuraj'oj prezentig's je renesanca maniero, evangeliaj verkistoj similas al sciuloj je tipo Leonardo da Vinc'i.
En alia kodiko entenanta evangeliojn de Nova Testamento, apartenanta al la jaro 1857 estas ankau' 4 majstrecaj gravuraj'oj. Unu el ili prezentas Markon meditante, sidanta sur seg'eto antau' malalta tablo kun skribiloj kaj c'e ties piedoj estas la figuro de majesta leono . La gravuraj'o prezentanta Mateon estas pli bela kaj pli artisma.Mateo estas skribante sian evangelion, sidanta sur seg''to, malantau''li estas figuro de angelo, dum sur fono vidig''s fenestro kun du kolonoj kaj klasikaj kapiteloj kie vidig''s mara pejzag'' kun velboato praa, arkitektonika pejzag'' same la haveno. Estas envere c''fverka gravuraj'o. La gravuraj'o de Lika prezentas la evangelian verkiston en pozo de meditado, same sidanta havante apud si la figuron de totema virbovo , malantau' li estas malfermita fenestro, kie vidig'as montara pejzag'o kaj la strukturo de kastelo kaj pli fore la maro. La gravuraj'o de Gjon estas same tre interesa. Gjon sidanta sur seg'eto kun cirkla dorso estas inklinig'inta skribante. Antau' li staras figuro de aglo kaj sur muro vidig'as fenestro duoncirkla de kie vidig'as blankaj nuboj enc'iele. Tiuj gravuraj'oj reprezentas altan artisman majstrecon.
Ambau' kodikoj menciitaj estas en la biblioteko de Monah'ejo de Sankta Vladimiro en Elbasan.

## 2. La osmana okupado kaj islamig'o de albanoj

**Ok**upite de osmanoj la kristana aparteneco de albanoj ( parte de la ortodoksa rito kaj parte de katolika rito) komencis tus'ati je favoro de disvastig'o de islamo , oficiala religio de la osmana s'tato. Sed la kontaktoj de albanoj kun la islama religio estas pli fruaj ol la osmana okupado de la albanaj teroj, c'ar g'is la antau'omana tempo tiuj teroj estas piedpremitaj de fojo al fojo de komercistoj, militistaj fortoj au' aliaj reprezentantoj de la orienta-islama mondo. Tamen, la komencig'oj de islamig'o de la albana log'antaro je formo de historia proceso, samtempe estas ligitaj kun komencig'oj de establig'o de la osmana jugo en Albanio.

La unua kiu spertis la fenomenon de konvertig'o al la islamo estis ja la supra parto de la socia piramido, la albana nobelaro. Ekde la dua duono de XIV jarcento kiam osmanaj inkursoj al Balkanio kaj Albanio plidensig'is, la albanaj princoj estis devigitaj kiu pli frue, kiu pli malfrue, akcepti la suverenecon de sultano kaj kiel ties vasalojn forsendi siajn filojn kiel stag'iojn c'e la osmana korto. Tie, post kiam ili konvertig'is al islamanoj kaj akiris respektivan edukitecon , ili komisiig'is per certaj servoj militistaj au' civilaj, atingante en pluraj kazoj ec' altajn funkciojn kaj postenojn kiel sandj'akbeoj, subas'oj ka. Inter la idoj islamigitaj de la albanaj feu'daj familioj senditaj c'e la korton de sultano kiel ic'oglanojn estis ankau' Gjergj Kastrioti ( islamigita per la nomo Skender), unu el la filoj de Gjon Kastrioti; Jakup Bej, la filo de Teodor Muzaka ( je la fino de jaroj 30 de XIV jc estis reganto de la Albana Sandj'ako); lia frato Kasem Pas'a, unu inter la plej distigitaj komandantoj de Murat la Dua kaj Mehmet la Dua; du filoj de Gjin Zenebishi ( unu el ili , nomita Hasan Bej, en la jaro 1455 portis la funkcion de subas'o de Tetovo) ka. Islamig'o de parto de la feu'da albana elito ekde la unuaj jardekoj de la osmana jugo formis tiel la unuan kontingenton de la albana islamigita popolo.

Dinamiko de proceso de islamig'o en la albana spaco akcelig'is establig'inte en la jaro 1402 de aparta devigaj'o nomita devs'irme. Lau' tiu la kristanaj familioj de la landoj sub la osmanan jugon, periodece devis doni filojn (devs'irojn) por plenigi la tac'mentojn de jenic'eroj (adj'emioglanoj) au' por aliaj bezonoj de la sultana palaco (ic'oglanoj).

Albanio estis unu el la okupitaj landoj kie la devigaj'o de devs'irmeo estis aplikata per plej alta severeco. La tasko de kolektado de filoj kristanaj kaj ilia forsendado al Istanbulo komisiis al unu el funkciuloj de korpuso de jenic'eroj, kiu ekipita per fermano de sultano kaj akompanata de sekretario, iris ne c'iujn regionojn, kiujn la fermano envorte devigis per devigaj'o de devs'irme. Kunlabore kun c'efmaljunuloj (kodj'abas'oj) la sendito de Istanbulo kolektis c'effamilianojn de c'iu vilag'o kaj postulis el ili venigu c'e lin c'iujn knabojn 12-15 jaraj. Inter c'i tiuj knaboj poste oni selektis plej bonajn je fizika aspekto kaj kapableco por elteni malfacilaj'ojn. Kutime oni prenis unu filon por c'iu familio kristana, ec' kiam tiuj lastaj havis plurajn filojn , ec' kiam ili havis solan filon. La selektitaj knaboj , vestite per longa tuko g'istere kaj surmetinte c'apon kun plumo surkape, alkondukatis al c'efurbo de imperio. Tagon de ilia alveno tien , ili dissendig'is po du personoj en la tieajn familiojn kaj poste gvidataj de agao (komandanto) de jenic'eroj , trapasis por revuo antau' Sultanon, kiu plej tau'gulojn tenis en liaj palacoj, la ceteron transpasigis por militista trejnado al apartaj instrukciistoj. La resto donatis al la osmanaj familioj en Rumelio kaj Anatolio, kie ili lernis la Turkan, faris diversajn laborojn en agrikulturo ktp. Ankau' tiuj lastaj, lau' bezonoj de la palaco de Sultano kaj

korpuso de jenic'eroj, se estis ellerninta la Turkan , ene de 2-3 jaroj povis reprenig'i de familioj por inkluzivig'i en la servoj de c'i supraj institucioj.
Ne malgranda kvanto de knaboj el kristanaj familioj, konvertig'inte al islamo, forsendatis por servi ankau' c'e palacoj de sandj'akbeoj au' bejlerbeoj. Tiuj lastaj nomig'is gulamojn kaj aperas dense en la osmanaj kajeroj de XV jc kiel posedantoj de timaroj.
La praktiko de devs'irmeo dau'rinta g'is la fino de XVII jarcento ludis la c'efan rolon en la kreig'o de la albana militista tavolo kiel konsistiga parto de la osmana militista klaso. La islamigitaj elementoj el la albanaj teroj, kiuj edukig'is c'e la sultana palaco au' c'e sarajoj de osmanaj regantoj de provincoj, g'enerale au' plenigis la korpuson de jenic'eroj, ( osmana armeo) au' formis la regantan aparaton de la osmana s'tato en Albanio. Estante enkadrigitaj en la osmana hierarh'io , tiu c'i parto de la albana log'antaro farig'is posedanto de timaroj , zeametoj kaj hasoj kaj ludis tiel grandan rolon en la disvastigado de islamig'o en la ceteran parton de la log'antaro.
La penetrado de la islama religio en la vicojn de la albana popolo esprimig'is unue en la urboj. Establig'inte la osmana s'tatpotenco la albanaj urboj ekfunkciis kiel administraj, ekonomiaj kaj kulturaj centroj de la nova sistemo politika. Konforme al ilia rolo ekonomia kaj socia en la urboj koncentrig'is ne nur la plimulto de la osmana administranta kaj militista personaro , sed ankau' la islama eklezio kun siaj institucioj de kulto kiu multoblig'is rapide.
La c'efaj albanaj urboj kiel Elasan , Prizeren, Shkoder, Vuc'iterna (hodiau' Vus'tri) ka farig'is sidejoj de c'efaj sciuloj de la provinca osmana potenco, kiel de sandj'akbeoj, alajbeoj, kadioj (jug'istoj) ka. Aliflanke la c'efaj branc'oj de la albana ekonomia kaj socio kaj la albanaj urboj ekmodelig'is konforme al la postuloj de armeo kaj altaj funkciuloj de la osmana s'tatpotenco en provincoj kaj centro. Estis tamen urboj kiel Gjirokaster, Vlora, Berati kie ankorau' je komencig'o de XVI jarcento ne estis iu muslima domo (ni esceptu c'ie klason militista –administran kaj eklezuloj)
Tamen sed la urbo de Shkoder je la jaro 1485 havis 26 muslimajn domojn, Peja 23. En Vuc'iterno ke 1487 estis 33 muslimaj domoj el 107 entute.. En Pris'tino estis 51 domoj muslimaj el 2999 entute, dum en Tetovo 41 el 264 en lajaro 1468.

### 5.2. **La formoj kaj vojoj de islamig'o de albano**j

La osmana imperio kiel islaman s'taton akceptis la ekziston de aliaj religiaj komunmoj kondic'e ke ili agnosku la potencon de sultano kaj pagu certan imposton, dj'izjo-n kiel rekompencon por protektado g'uantaj sub la ombron de sultano.
Selimi la Dua kaj Murato IV, du sultanoj klopodig'is islamigi perforte la log'antaron sed ili renkontig'is al la kontrau'staro de altaj gvidantoj de la eklezio muslima.
Tamen, ne eksludig'as ankau' la multaj kazoj de la s'tata perforto por deviga islamig'o de albanoj. La sistemo de kaptitoj kaj devs'irmeo menciita jam, estis potenca faktoro de islamig'ado. Ankau' la klaso administra-militista selektita inter la etnaj albanoj, posedante la politikan s'tatpotencon same tiun ekonomian kaj servinta en la albanaj regionoj, estis alia faktoro de islamig'o , nature.
Samtiel la jardeka rezistado de albanoj en la sangumaj bataloj kun omanoj (ni menciu la periodon de Skanderbeg) kaj la grandaj homaj domag'oj, materiaj kaj kulturaj trafintaj la popolon dum tiuj militoj farig'is faciligaj kondic'oj por penetrado de islamo. Multaj albanoj lasis la urbojn kaj elmigris eksterpatrion. Tial oni rimarkas ekz en Shkoder ke ekde 1485 c'irkau' 48 % de la log'antaro estis jam islamigita. En multaj kazoj la

c’irkau’brakig’o de la islama religio fare de albanoj ig’is por eskapi la punon de la osmana s’tatpotenco pro partopreno en la ribelig’oj.
La pago fare de la log’antaro kristana de la imposto de dj’izjo estis alia motivo forta al islamig’o. Multaj individuaoj akceptis islamon por eskapi la socian diskriminacion kaj kiel rimedon por certigi al si la politikajn kaj ekonomiajn antau’ecojn ofertantaj de la tiutempa osmana socio. Multaj albanoj volis profiti de la armea servo sed por tiu celo oni postulis ke ili akceptu la islamon. Praktiko de konvertig’o de religio pro politika pragmatismo, estis jam c’e albanoj praa tradicio.

**Vojoj de islamig’o**
Islamig’o estig’is per du vojoj: per volontula transpaso de la urba log’antaro, per meh’anika movig’ado de la kampara log’antaro islamigita antau’e je direkto de urboj . Tiel en Berat je 1583 estis 185 metiistoj alvenintaj el vilag’o, dum en Elbasan 39.
La nova religio estis notinta grandajn sukcesojn je la fino de XVI jarcento en tiaj urboj kiaj: Shkoder (100 %), Peja ( 90 % ), Vuc’iterno (80 %), Elbasan ( 79 %), Tetovo ( 71 %), Kerc’ovo (65.5 %), Kruja ( 63 % ), Berat kaj Pris’tino po 60 %, Prizereno (55.9 %), Dibra ( 51 %), Tepelena (50 %), Permeti (41 %), Novoberdo (37 %), Struga (24 %), Vlora (23 %), Korc’a kaj Trepc’a ( 21 %), Janievo (14 %), Delvino (4 %), ks.
La dinamiko de islamig’ado rimarkeblas pli granda en la urboj de Kosovo. Tio eksplikatas per la politikaj cirkonstancoj apartaj ekzistintaj en Kosovo en la momentoj de establig’o de la osmana s’tatpotenco. La albana log’antaro de Kosovo trovig’is tiutempe sub la politikan serban regadon, dum la religia potenco ekzercadis c’i die de Serba Patriarh’ejo de Pejo. Sekve de tio, la likvidig’o de la serba jugo kaj la malfortig’o de la pozicioj de la serba eklezio establig’ante la osmana s’tatpotenco, donis okazon al la log’antoj de la regiono eskapi de la influo de la supre menciita eklezio, c’irkau’brakante la islaman religion kie unu el la rimedoj de esprimig’o de ilia etna diferenco disde serboj.
En XVII jarcento komencig’is la amasa islamig’o ankau’ de la kampara log’antaro. Tiel el 109 vilag’oj de diocezo de Shkoder je 1703 jaro estis islamigitaj 51 % de la log’antaro; en 52 vilag’oj de Zadrima (Sapa) 20 %; en 69 vilag’oj de Lezhe 11 %; dum en 114 vilag’oj de Durres 49 %. En la jaroj 20 de XVIII jarcento preskau’ la tuta log’antaro de Meza Albanio estis c’irkau’brakinta la islamon, dum en la Suda Albanio iom pli malfrue. En la jaroj 1735- 1740 plejparto de log’antoj de Vlora, Berat kaj aliaj regionoj c’irkau’e forlasis la ortodoksian eklezion kaj pasis al la islama religio.

**Kriptokristanismo**
Oni rimarkas interesan fenomenon, tiel nomatan kriptokristanismon , t. e. la staton de dureligieco en multaj albanaj hejmoj , kiel formon de rezistado al la nova religio. Kristanaj individuoj c’irkau’brakis la islamon nur formale, cele por ke ne pagu la imposton de dj’izjo (tributo) kaj g’uu egalecon kun la muslima log’antaro en la socia vivo. Dum en la publiko tiuj c’i individuoj sin prezentis kiel muslimojn kaj portis nomojn el la sfero muslima, frekventis moskeon ktp en siaj familioj kas’e ili ekzercadis la kristanan eklezion.
En multaj kazoj la islaman eklezion akceptis nur la c’effamiliano en interrilatoj kun la osmana s’tatpotenco, dum la aliaj membroj de la familio plurestis kristanaj. La kas’ita kristanismo estis komuna fenomeno de katolikoj kaj ortodoksuloj. Aparte katolikoj faris tion por eskapi la raprezialiojn de la osmana s’tatpotenco post la militoj veneciaj-

aus'triaj –osmanaj de la jaroj 1683- 1690. Ilia nombro pliig'is post la au'stria-osmana milito de 1737-1739 jaroj. Tiu situacio renkontis la kontraustarig'on fare de Katolika Eklezio kaj Papo ekzercantaj premon sur la kriptokristanoj kredantoj por ke tiuj lastaj rezignu ankau' publike de islamo. Sed ankau' tiuj kriptokristanoj estis devigitaj ofte rezignu de islamo, kiel tio okazis kun la log'antoj de Shpati (registritaj kiel muslimojn) kiam oni alvokis ilin al la armeo en la jaro 1832. Ili rifuzis deklarante sin kristanaj kaj akceptante la respektivajn ekonomiajn devigaj'ojn.

## 5.3. La islamaj sektoj

Islamo estis disvastigata en Albanion ne nur en sia c'efa varianto, sunita sed ankau' je formo de diversaj sektoj (tarikatoj) , kiel estis bektas'iismo, helvetismo, rufaismo ka. Atestaj'o por c'i tio estas teqeoj konstruitaj en nombro da log'lokoj.

**Bektas'iismo**

Bektas'ioj aperis unue je formo de ordeno de dervis'oj en la azia parto de Osmana Imperio (Anatolio). Fondinto kaj protektinto de tiu mistika ordeno estis Haxhi Bektash, naskita en Irano en la jaro 1249 kaj lokig'inta en Turkio en la jaro 1284. Apartan rolon en la konceptig'o de ideoj de Haxhi Bektash havis liaj kontaktoj kun la aziaj eklezioj de budismo kaj hinduismo dum liaj vojag'oj estigitaj en Hindio, Tibeto kaj C'inio.
La fondintoj de bektas'iismo starig'is ekde komenco kontrau' la doktrineca severeco kaj dogmantismo, proklamante la amon por c'iuj, fratecon kaj unuig'on. Alie ol la islama tradicio , bektas'ioj disvolvis sian beletron religian c'efe en la osmana lingvo kaj ne arabe au' perse. Unu el la c'efaj misiistoj de Haxhi Bektash, famig'inta pro prediktado de la bektas'ia ordeno sur la balkanaj spacoj, estis Sari Salltek, pri kiu cirkulas multaj rakontoj kaj legendoj. Sari Saltek, kiu transformig'is en unu el la plej distingitaj personecoj de bektas'iismo, je komencig'oj de XIV jarcento forsendig'is de Haxhi Bektash en Balkanion kaj Albanion kaj maskita sub la pelerinon de kristana monah'o , per aparta pacienco kaj prudento, laboris por dissemi la bektas'ian kredon. Shkupi, Ohrid, Kruja kaj Janina estis la c'efaj urboj kie haltis Sari Saltek por plenumi la supre menciitan mision. La bektas'ia sanktulo helpatis en sia laboro de nombro da dervis'oj, kiuj disvastigis la bektas'iajn principojn sin prezentante publike je la nomo de profeto Jezu Kristo kaj ne de Haxhi Bektash. Sari Saltek kaj liaj kunlaborantoj fondis en Korfuo ankau' "ortodoksan instituton" kiu envere uzatis por disvastigi en la popolon ideojn de libereco, amo kaj bektas'ia disciplino. Je la fino de XV jarcento, sultano Balim donis la definitivan formon al tiu ordeno.
Ekde komenco, bektas'iismo sin prezentis kiel liberalan sekton, estas tre proksima je multaj aspektoj al kristanismo. G'i bazig'is sur: la veron (hakikato), scion (marifeto), kaj leg'on (s'eriato). C'i tiuj principoj konsideratas kolonojn de bektas'iismo.
Alie ol sunitoj , bektas'ioj drinkas alkoholon kaj permesas al virinoj teni malfermita la kapon. Ili respektis la ekziston kaj la liberan disvolvig'on de nacioj kaj diversaj religioj. Ili preg'is dufoje tage, fastis nur dek tagojn. Bektas'iismo estis alloga aparte en Albanio kie la kristana eklezio interplektig'is kun paganaj elementoj. Evliha C'elebi mencias teqeon de Haxhi Bektash Veliu en Kanino konstruita de Sinan Pas'a kiel bonfaraj'on (XVII jarcento). En Vlora ekzistis ankau' teqeo de Patro Sultano ( Kuz Baba), en Gjirokaster la plimulto de la log'antaro eksidis kaj ekstaris menciante Patro Ali, festis, preter Bajramon ankau' Sankta Georgon, Nevruzon, Shen Mitro, Sari Saltek drinkante vinon kaj brandon. Samtiel, en Pogradec, Mitrovice, Kac'anik ka . Kruja estis farig'inta

grava centro bektas'ia. La s'tonoj de kelkaj tomboj tie datig'as el 1717 kaj 1728 jaroj. Preter teqeoj tie en la Kreshta e Malit ekzistis la sankta loko je nomo de Sari Saltek, hodiau' granda pilgrimada centro por c'iu kredulo..Ali Pas'a Tepelena estas subteninta c'i tiun ordenon. Li havis malvastajn rilatojn kun Shen Memiu (Sankta Memi) kiui havas teqeon en Kruja ekde la jaro 1802. Ali Pas'a helpis per mono kaj subteno dervis'ojn. Li pagis 20 000 frankojn kaj multekaran domon al Sheh Bursliu, alveninta el Prevezo, samkiel al Seid Ahmed Efendi alveninta el Maroko, en la urbon de Parga. Multajn agrojn pa'sao de Janina estis donacinta al Sheh Ahmeti alveninta el Sirio. C'ar bektas'ioj havis rilatojn kun la korpuso de jenic'eroj, likvidinte tiun korpuson fare de Sultano ankau' al bektas'ioj komencis la persekvadoj. En Albanio Ali Pas'a havis rivalecon kun bus'atlioj de Shkoder kiuj estis partizanoj de la sunita sekto.

### Helvetismo

Fondinto de Helvetismo estas Omer el Halveti el Tabriz de Irano ( XIV jc). Distingita reprezentanto estas same Sejid Jahja Shirvani el Baku. Tiu c'i sekto postulas ke la kredulo sin deteni en separatan c'ambron por "plenumi la riton de zikri" kiu rilatas al la mencio de Dio lau'tvoc'e sub diversaj nomoj aparte trovitaj por tia celo. S'ehoj kaj dervis'oj helvetiaj estis alianculoj de la osmana s'tatpotenco por konservado de la sunita kredo tial ne trovis multe da disvasteco en Albanio. Delvina kaj Vlora estis la c'efaj centroj sed ili enspirig'is de Janino kie je la jaro 1930 Sultano Bajazito estis rajtiginta Gazi Evrenozon por konstrui teqeon. Sed tiaj helvetiaj teqeoj estas konstruitaj ankau' en Berat, Korc'e, Elbasan en XV-XVI jc. En XVIII jarcento g'i disvastig'as ankau' en Kosovo kaj Okcidenta Makedonio. Tiel tiaj teqeoj trovig'as en Prizereno, Gjakove, Manastir, Kerc'ovo ka. En la centro de Tirana trovig'as helvetia centro ankorau' hodiau'.
En la kondic'oj de sendependa albana s'tato kaj de post Unua Mondmilito muslimoj sunitaj reorganizig'is en la jaro 1921 per Nacia Muslima Kunveno. En la jaro 1923 la sunita komunumo dividig'as de kalifato de Istanbulo elektante kiel prezidanton Myftion de Tirana. En tiuj jaroj en la albana islamo aperas reformema karakterizaj'o c'ar oni malpermesas poligamion, publikig'as an la albana Kurano kaj la muslimaj deputitoj postulas ke virinoj partoprenu socian vivon samkiel la viroj, kio ekrealig'as per la leg'o de demeto de nigra longa kaptuko de muslimaj virinoj (vualo)en la jaro 1937. En la jaro 1923 aperas la revuo "Alta voc'o" kun akcentitaj patriotismaj kaj reformemaj sentoj.
En la jaro 1929 okazas kongreso de muslimoj sunitaj kie oni decidis ekskluzivan uzadon de la Albana kaj reduktig'on de nombro de moskeoj, unuecigon de medreseoj (religiaj mezlernejoj) ka. C'i tie intervenis ankau' Zog la Unua cele al unuig'o de la lando kaj okcidentigo de Albanio demetamte de g'i definitive la imag'on de muslima lando. Oni diras ke ec' Ataturk, la plej granda reformisto de tiu tempo, j'aluzig'is pro reformema spirito de Zog, c'ar ne plac'is al li ke tiu lasta superigi lin je tiu direkto.
La bektas'ia komunumo en Albanio sin proklamis sendependa en la jaro 1921. Multaj teqeoj de bektas'ioj farig'is centrojn de rezistado kontrau' italojn kaj germanojn kiel ekz. Baba Fejzo kaj Baba Faja kalkulante ke dum la milito estis 6000 bektas'ioj organizitaj.

### 5.4. Konsekvencoj de la disvastig'o de Islamo en Albanion

**Tiu c'i** estas ja proceso je multflankaj sekvaj'oj por la ekonomia, socia kaj kultura vivo de popolo. Unue s'ang'ig'is la konfesia strukturo, nun inkluzivig'is en g'i ankau' la muslima log'antaro. Tio aperis en multaj muslimaj kvartaloj kreitaj aparte en urboj. Tiuj

kvartaloj (mehaloj) nomumig'is lau' la nomoj de distingitaj homoj de regiono, de kapoj de esnafoj au' muslimaj kleruloj, samtiel lau' la nomoj de diversaj moskeoj. S'ang'ig'is ankau' la urbanistiko kaj arkitekturo de albanaj log'lokoj. Multaj preg'ejoj transformig'is al moskeoj, konstruig'is multaj objektoj de la islama kulto (moskeoj, teqeoj, medreseoj, bonfaraj centroj - imaretoj). La islamaj normoj kaj reguloj disvastig'is ankau' en la kampo de organizeco de ekonomia agado, aparte de metiarto en la urboj..En la moroj, geedzig'festoj kaj artisma agado (bus'a kaj skriba) ekaperis elementoj de la islamo-orienta kulturo. La geedzig'festoj nun komencis estig'i ene de religia komunumo. S'ang'ig'is ankau' la vesto, aparte de la muslimaj virinoj . Nombro da vortoj turko-arabaj penetris en la nomenklaturon de artikloj de hejma uzado, kulinario ks.

**5.5.. Kontribuo de albanoj al la islama kulturo**

Aliflanke, albanoj estas kontribuintaj notinde al la islama kulturo. En sia libro je titolo "Kontribuo de albanoj en la islaman kulturon: Hasan Kaleshi elvolvas la kontribuaj'ojn de albanoj sur la diversaj kampoj de la islama kulturo. Ni apartigas kelkaj el ili.

Surkampe de poezio estas distingita Jahja bej Dukagjini. Li estas lasinta grandan Divanonc, erte en la Turka. Pri g'i Gibb diras ke "el c'iuj fremduloj, tio estas neturkoj, li okupas lokon je vera valoro. Ekzistas difinita simpleco, forto kaj originaleco en lia skribmaniero kio disigas lin radikale de la plej grandaj poetoj de tiu tempo, Zati kaj Hajali. Rememoras ke tiu tempe kiom granda estu la imitado de la persaj klasikaj poetoj inspiritaj de islamaj motivoj, tiom multe aprecatis ankau' la verkisto. Inter la verkoj liaj sin distingas "Jusuf kaj Zulejha", "Libro de principoj", "S'aho kaj almozulo".

Alia poeto estis Mesihi el Pris'tina, kiu mondfamig'is per la versaj'o "Kanzono de printempo". Jen kelkaj ties versoj:

Au'skultu kiel kantas najtingalo; jen alvenis printempo.
Florig'is floroj en c'iu g'ardeno, danco, jen estas okazanta,
Kaj el la arbo de migdalo alvenas fluge la somero
Drinku kaj amuzig'u c'ar baldau' forpasos ankau' printempo.

Suzi el Prizereno estas eldoninta "Libron de konkeroj de Mihaloglu Ali Bej" kun 1500 bejtoj (versaj'etoj) duversaj. Tiu verko estas la plej bona en sia g'enro. Jen kelkaj versoj el g'i:

Vin gardu, ne transpasu viajn limojn, c'ar la sorto
Igos vin ridindulon antau' la log'antoj de la mondo,
Frato, estu prudenta, ne levu tro alten la kolon.
La c'ielo estas sanguma, c'iutage g'i senkapigas
Pas'u, sed zorgeme, ne plilongigu tro la pas'ojn,
C'ar en c'iu pas'o estas miloj da baroj kaj vi embarasig'os!
Ne malfermu al la mondo vian bruston, kiel s'irmilon
C'ar g'i farig'os trafsigno de la c'ielaj sagoj,
Princo, ne pensu ke c'iam vi havos por si la fotelon
C'ar al Husreto (persa reg'o) la sorto demetis
La kronon de lia kapo!

Estas ankau' multaj aliaj poetoj kiel la frato de Suzi, Nehari, Saji Shemi, Behari. Adj'ize Baba, Buhari, Mehmet Akif (kies nomon portas turka gimnazio en Tirane ankorau' hodiau'), Abdurrahim Efendi Priezerenasi ka.
Multaj albanoj sin distingis ankau' en la mistika poezio rilatanta al la disvastig'o de diversaj tarikatoj (sektoj). Tiel ni havas la poezion de Ahmet Bej Dukagjini, Dervish Suman, Sersem Ali Dedei, Umi Sinani ka.
Albanoj sin distingis ankau' kiel historiistojn. Lutfi Pas'a estas unu el ili, en la tempo de Sultano Sulejmano. Li kompilis 12 verkojn el kiuj okulfrapas du: Asafname kaj Historio de Osmana Imperio, Koc'i beu estas konsiderata kiel Monteskje de Turkio c'ar sin distingis kiel teoriulon kaj grandan kritikiston de la turka feu'da sistemo. Sub la influon de Koc'i beu sultano entreprenis vicon da severaj rimedoj: malpermesis alkoholon kaj fumadon, ordonis pereig'i fizike la kapoj de jenic'eroj kaj perturbantaj spahioj, koruptitaj kaj pigraj oficistoj, kiujn li ekpersekutis kaj kondamnis, entreprenis rimedojn por reorganizeco de sistemo de timaroj kaj zeametoj, startis la batalon kontrau' s'mirmono kaj protekcionismo.
Inter la aliaj historiistoj estas ankau' Hajrudin Leskoviku kiu estas lasinta la verkojn: Politika historio de la milito de Krimeo, Historio de vojag'o de ambasadoro, Esploroj pri historiaj kaj politikaj dokumentoj, Kritiko al Emil Zola ka.
Mufid Libohova estis ministro pri eksteraj aferoj den la registaro de Turhan Pas'a en la tempo de Princo Wied . Li sin distingis same kiel historiiston de Turkio. Prezentas intereson lia kontribuo kiel historiisto de Ali Pas'a Tepelena. "Fremdaj au'toroj , skribas li, kvankam estas skribintaj multe pri Ali Pas'a, en la plejparto similas al legendoj kaj grekaj mitoj, estas plenaj de eraroj, falsaj'oj kaj s'ovinismaj'oj kaj malamo por la islama religio, same kiam en la tempo de kruciroj en Mezepoko".

6. **Religia solidareco c'e albanoj**

**Divido de la lando lau' la religia kredo**

L albanaj kreduloj renkontig'as kie ajn en la spaco log'ata de albanoj sed la denseco de reprezentantoj de certa eklezio diferencas lau' la regionoj de la albana spaco en Balkanio kaj enmonde. Tiel la nordorienta regiono de la lando (Tropoje, Kukes, Diber, Has, Mat), montaro de Tirana kaj de Kruja, Mallakastra, montaro de Kerraba, Kurvelesh kaj Skraparo, Kosovo kaj okcidenta parto de Makedonio estas log'ataj c'efe de log'antaro de muslima eklezio.

Regionoj de Alpoj, Mirdita, montaro kaj la kampo de Lezhe, parte, Kurbin, areo de Shkoder kaj arberes'oj de Italio estas log'ataj c'efe de log'antoj de kristana katolika eklezio.

Regionoj de Kampo de Myzeqe kaj areo de Berat, valo de rivero Drino, Lunxherio, Pogon-Zagorio, Jonia marbordo, Rreza e Tomorrit, parte sudorienta regiono kaj intermonta kampo de Delvino estas log'ataj de log'antoj de kristana ortodoksa eklezio.

En la urboj renkontig'as c'iuj eklezioj, dum en kelkaj urboj kiel Tirana, Elbasan, Vlore, Korc'e, Durres renkontig'as c'efe log'antoj de kelkiu eklezio pli multe.

Apartecon kaj originalecon prezentas Shkoder, Tirana, Gjirokaster, Elbasan, Vlora, Korc'a, Durres, kie estas penetrintaj ankau' novaj eklezioj post la jaro 1990 kiel protestantismo,Baha'i , atestantoj de Jehovo ka.

1.1. **La religia solidareco**

Spite de linio de Teodoso kiu disdividis ambau' romiajn imperiojn kaj trapasanta ien inter Shkumbin kaj Mat, albanoj estis toleremaj je religia sento kaj neniam sangvers'is pro religiaj motivoj. Mark Milan estis c'efministro de Montenegro kaj asertis ke "kiomfoje ni klopodis instigi en Shkoder katolikojn kontrau' muslimojn au' inverse ni perdis c'iam la batalon c'ar albanoj posedis pli fortan nacian senton".

La ekziston de religia toleremo rimarkis ankau' la italaj fas'istoj kiuj kompilis strategion por konservi tiun ekvilibron tiom, kiom katolikoj sentis sin iel forlasitaj.

Ekde la fino de Mezepoko kaj poste la albana spaco estis ekvilibra zono inter plej potencaj imperioj de la tempo, Osmana kaj Austria-Hungara. Ambau' imperioj subskribis kapitulaciojn regulantaj la egalecon de influoj, rekonante al Okcidento la rajton prizorgi pri preg'ejoj de la kristanoj, per la doktrino "kultus protectorati".

En Albanio vi povas trovi du religiojn (kristana kaj muslima) en la sama familio au' en la sama gento (Lure) au' du religiojn c'e la sama homo (Shpat) kiu portas du nomojn, unu kristanan kaj unu musliman kaj sekvas la ritojn kaj religiajn festojn de ambau' eklezioj. La nacia heroo Gjergj Kastrioti naskig'is en ortodoksa familio, farig'is muslimon en la korto de Sultano, farig'si bektas'ion (estis ja kondic'o por farig'i jenic'eron), revenis en Albanion kaj ricevis la religion de la patro (ortodoksa) kaj kiam estis mortante petis kiel testamenton entombig'i en monah'ejoj de Athos, unu el sanktaj lokoj de ortodoksismo.

En Albanio oni ne konas religiajn konfliktojn , ne ec' je formo epizodeca. Estas tute normale por albano, ke se al li ne plac'as la pastro, lia predikto au' liaj preg'oj, forlasas la preg'ejon kaj serc'as rilaton kun Dio en moskeo..En la libro "C'eta e Profeteve" Pjeter Bogdani citas unu preter la alian Kalvinon kaj Avicenan. La unua tradukisto de la libro de muslimoj, Sankta Kurano, en la Albanan, estis kristano, Ilo Mitke Qafezezi.

Albanaj muslimoj festas Shen Gjergj kaj Shen Meri, alia parto Shen Nikolle kaj Kristnaskon, dum la kristanoj vizitas amike muslimojn okaze de iliaj karakterizaj festotagoj, Kurban-Bajramo, ka.
Estas multaj rakontitaj kaj travivitaj kazoj kiam la pastro estis devigita kanti syfyrojn de Kurano por honorigi mortintan muslimon c'ar la mulao kaj moskeo estis tre fore kaj la vetero estis tre malbona pro neg'o kaj tempesto.
En urbo kiel Shkoder kie la muslima log'antaro estas miksig'inta kun kristanoj katolikaj kaj ordtodoksaj , en tagoj de Ramazano ankau' la kristanaj komercistoj haltigas la vendon de la porkaj'oj en iliaj vendejoj. Same en Shkoder estis la noblaj familioj muslimaj kiuj gardis la konstruadon de katolika preg'ejo kiam kelkaj fanatikuloj komencis detrui ties fundamentojn dumnokte. "Ne tus'u g'in c'ar tio estas nia fundamento" diris ili.

## 1.2. Kial la religio ne kvereligas albanojn?

**Kvanka**m la enkonduko de islamismo en la albanajn terojn profundigis la religian diversecon enlande, tio ne akompanatis per disdivido kaj malkomponigo de la albana nacio. Samkiel kristanismo, ankau' islamismo farig'is popola religio fore de maltoleremo la religia fanatismo. Ambau' religioj estis surmetitaj sur potencan liton plifortigita dum historia fluo de agado de faktoroj de koneverg'o, kiel estis ja la karakterizaj'oj etno-psikologiaj, komuna lingvo kaj kulturo ka. Des pli, disvastig'o en niajn terojn de la diversaj islamaj sektoj (tarikatoj) preter sunitismo plimildigis sufic'e la klimon de interreligiaj rilatoj en albanaj teroj. Apartan rolon tiudirekte estas ludinta la bektas'ia ordeno, kiu estante pli proksima al ambau' c'efaj eklezioj , prediktante toleremon kaj bonkomprenemon de la log'antaro kontribuis al la bremsado de disdividaj emoj en la sino de log'antaro kaj plifortig'o de ligiloj de unueco sur etnaj kaj naciaj bazoj.
La katolika misiisto Pjeter Mazreku en raporto sendita al Sankta Sidejo de Romo en la jaro 1633, ne sen miro, akcentis: c'ar oni sidas tuttempe kune multaj aj'oj lernig'as de kristanoj helpe de senreligiuloj (muslimoj) kiel ekz. festi la vendredon kiu estas c'efa festotago de turkoj (muslimoj) kaj senfinajn superstic'ojn. Turkoj (muslimoj) kiel devenintoj de kristanoj, konservas multajn kutimojn de kristanoj; rigardante la festojn ili invitas unu la alian okaze de mortoj, geedzig'festoj au' aliaj solenaj'oj. Multaj el tiuj kristanoj donante al kaj prenante de ili kredas ke ankau' ili sanig'as se ili plenumas kelkaj malbonojn.
En multaj kazoj la diferencoj en religia aparteneco malkonsideratis okaze de geedzig'oj. Kristanaj knabinoj edzinig'is al muslimaj knaboj. Infanoj baptig'is en preg'ejo. Fan Noli skribis ke albanaj kamparanoj se bezonate, sen religia distingo, frapas al la pordo de pastro, mulao au' Babao. En vilag'o multe da tempo virinoj ne kovras la vizag'on per vualo.

## 1.3. Islamig'o-faktoro por konservi la albanan etnecon

**La ama**sa islamig'o de log'antaro ne tus'is la etnan karakteron de la albana popolo. En albanaj regionoj apud la landlimo kun fremdaj etnecoj la proceso de islamig'o estis ja unu el faktoroj influinta en la apartig'on de la albana log'antaro kaj de ties teroj disde la najbaraj popoloj. Tion oni povas diri aparte por la etna landlima zono komencig'anta de nordaj albanaj teroj (hodiau' ene de Montenegro) kaj kontinuante al tiuj nordorientaj (Kosovo) kaj orientaj ( albanaj teroj ene de la politikaj limoj de hodiau'a Makedonio)

## 2. La albanaj eklezioj post la proklamig'o de sendependeco

### 2.1. La autocefala albana ortodoksa eklezio

**Je la fin**o de XIX jarcento kaj komencig'o de XX jarcento la albanaj patriotoj en ekzilo, c'efe ortodoksaj komprenis frue ke por kontrau'stari la politikon kaj praktikon helenigan de Grekio oni devas posedi Au'tocefalam Ortodoksan Albanan Eklezion. La unuaj tentoj okazis de Nikolla Nac'o en Buh'aresto . La leg'a rajto por autocefalio naskig'is por la ortdoksa albana eklezio ekde 28an de novembro 1912. Proklamig'inte la sendependeco de Turkio, la albana ortodoksa eklezio ne povis plu protektati jure de Patriarh'ejo, kiu estis sub juridikcion de Turkio. Tio estis okazinta ankau' al la aliaj log'antaroj de Balkanio okupitaj antau'e de Turkio (grekaj, rumanaj, bulgaraj serbaj). En Usono tiu klopodo komencig'is en la jaro 1907. Albanoj fondis religian asocion "Albana Honoro". Ili alvokis pastron el Albanio, Fan Nolin , en la jaro 1908, kiu farig'is pastro pere de tri episkopoj- unu rusa, unu ukrainia kaj unu rumana. Li gvidis la unuan meson en la albana lingvo je 22an de marto 1908. En South Bridge konstruig'is la preg'ejo de Shen Koll, pli malfrue en Filadelfia la preg'ejo de Shen Pau'lo kaj Shen Pjeter. Noli tradukis c'iujn necesajn religiajn librojn. Je 16an de marto 1919 okazis la Kunveno por formig'o de Albana Autocefala Eklezio en Bostono. Je 21an de novembro 1923 okazis la unua Sinodo en Berat kun Noli kiel c'efepiskopon. Je la formulo "Libera preg'ejo en libera s'tato" okazis la dua kongreso tutortodoksa en Korc'e je 16an de junio 1929.

La reg'o Zog la Unua sekvis neutralan politikon al la religio. Li ec' je 12an de aprilo 1937 rekonis al la Albana ortodoksa Eklezio oficiale rektan dependecon de Patriarh'ejo kaj g'i proklamig'is autocefala.

### 2.2. **La religiaj kredoj dum la periodo 1944-1990**

La komunista reg'imo en la jaro 1945 krucigis unue la Katolikan Eklezion de Albanio, konsiderante g'in "neston" de fremdaj agentoj en Albanio. Oni postulis de g'i proklami sian autoceflecon. Sed tio estus granda sakrilegio kanonika, tial la episkopoj Gasper Thac'i kaj Vinc'enc Prenushi ne akceptis. Ambau' ilin oni enprizonigis, la unua estis kondamnita al morto dum la dua al 20 jaroj da enprizonig'o, kiu mortis poste en la prizono. Oni arestis 30 franceskanojn, 15 jezuitojn kaj multaj seminaristojn. Kelkaj el ili estis mortpafigitaj (Dom Ndre Zadeja, Frano Gjini, Fj. Volaj, Patro Ciprian Nika, Nikoll Gazulli, kun lastaj vortoj "Vivu Kristo-reg'o, vivu Albanio ankau' sen ni!"), la ceteraj finig'is en koncentrejoj au' deviga laborejoj.
Je 1967 jaro estis mortpafigita Zef Bici je preteksto ke li estis kontraus'tarinta al la junulara aksio por detruado de preg'ejoj kaj moskeoj. Ernest C'oba, episkopo estis kondamnita ekde 1964 je 25 jaroj da enprizonig'o. Tiamtempe enprizonig'is ankau' Mikel Koliqi, la unua albana kardinalo.
Envere, la katolika komunumo ne entreprenis la iniciaton de autocefaleco kiel ortodoksuloj, sed de facto g'i estas realig'inta tion, c'ar la klerularo de franceskana eklezio estas teninta rilatojn c'efe kun Au'strio, alie ol jezuitoj kaj dominikanoj kiuj estas konservintaj la rilatojn kun Vatikano.
La Sinodo III de la albana ortodoksa autocefala eklezio restis g'is la jaro 1949 kiam c'efepiskopo Kristofor Kisi rezignaciis je sia posteno.

Sinodo IV kun c'efepiskopo Paisi Vodica starig'is au'guste 1949. Pro politikaj kialoj Paisi Vodica ligis la Albanan Ortodoksan Eklezion kun patriarh'ejo de komunisma Rusio.

### 7.2.1. Religio dum la periodo de ateista s'tato 1967-1990

Je 1967 jaro la religiaj kredoj kaj ties institucioj c'esis funkcii perforte fare de s'tato komunista. Tiu movado nomig'is kvazau' movado de ateista junularo. Multaj preg'ejoj transformis al publikaj haloj, staloj au' ruinigis komplete. Oni detruis 2169 objektojn de kulto kiel preg'ejoj, moskeoj kaj teqeoj. Oni enprizonigis 217 klerulojn por teroro kaj kelkaj el ili mortis en la prizonoj au' estis mortpafigitaj. La penala kodo en la jaro 1977 kondamnis la religian propagandon samkile la disvastig'on de liturgio. Lau' tiu kodo estas kondamnitaj multaj ekskleruloj sed ankau' laikuloj.
La katolika eklezio de Albanio kiu estas doninta al la lando dekoj da intelektuloj, esploristoj renomaj, poetoj kaj verkistoj kiel patro Shtjefen Gjec'ovi, Preng Doc'i, patro Gjegj Fishta, Dom Ndre Mjeda, patro Donat Kurti ka trafig'is je unu el plej grandaj frapoj dum la tuta g'ia historio en Albanio.
La proklamig'o de Albanio ( de tero kie prediktis unue apostuloj de Kristo kiel Pau'lo; de tero de Skanderbeg kiu enkondukig'is en la historio de eklezio kiel ties plej fidela protektanto) kiel la sola ateista s'tato enmonde, estas miriginte la tutan mondon. Diktatoro Enver Hoxha estas farig'inte pli kruela ol imperiestro Trajan. Sendepende de tio, albanoj ne lasis religian feston sen celebrante kas'e, en kondic'oj de terura povreco kaj provizado per kuponoj g'is la jaro 1990. En tiu g'enerala subtera agado kaj timego plifortig'is la sento de la religia toleremo.
Dume, la agado de Patrino Tereza ekster Albanio influis sufic'e multe. Post la renversig'o de la ateista sistemo en la jaro 1990, je 4an de novembro 1990 patro Simon Jubani restinta 26 jarojn en prizono kaj Karlo A. Sevilla, forpelita de Albanio en la jaro 1946 donis meson por vivuloj kaj mortintoj en malgranda kirko c'e tombejo de Shkoder, kiu servis kiel altaron. Partopreno en la meso estis eksterordinara. Samtage oni donis duvaon en la Plomba Moskeo en Shkoder por muslimoj. Startig'is denove la starig'o de preg'ejoj, moskeoj kaj teqeoj.

### 7.2.2. La religiaj kredoj post 1990

**Post la** jaro 1990 revenis Albanion la senditoj de Albana Katolika Eklezio, misiistoj kaj apostolecaj senditoj el Sankta Sidejo, inter ili ankau' albanaj katolikaj kleruloj kiuj transvivis en la prizonoj, kiel sia mos'to Mikel Koliqi, Frano Ilia, sia mos'to F. Mirdita, alveninta de eksterlando.
La ortodoksaj kleruloj transvivintaj komencis aktivig'i c'e la preg'ejoj kiuj postrestis kaj renovigis ilin. El Ekumena Patriarh'ejo oni sendis misiistan episkopon Anastasios Janullatos kaj komencig'is laboro por rekonstruo de preg'ejoj kaj repreno de iliaj proprietaj'oj.
Notinda estas la vizito de Papo Gjon Pau'lo II je 25an de aprilo 1993 kaj de Ekumena Patriarh'o Bartholemeo je 2-9 novembron 1999.
Renovig'is ankau' la Evangelia Eklezio de Albanio pere de kristanaj misiistoj kaj komunumoj en la tuta lando, aparte en urboj ankau' en Kosovo. Tiu eklezio sekvas la eu'ropajn tradiciojn, etendante sian aktivecon en la disvastig'o de bona novaj'o, aparte en la lernejoj, kie g'i donas valoran helpon.

Kristanaj sektoj kiel Baha'ullah, Atestantoj de Jehovo ka pli kaj pli estas disvastig'antaj nun en la tuta Albanio.

### 7.2.3. La inundo de fremdaj religioj en Albanion

**Nebibliaj movadoj en Albanio**

En nuntempo en Albanio agadas tiel nomataj "nebibliaj movadoj". Tiun nomon ili estas akirintaj c'ar ili ricevas el Biblio parton kaj transformas g'in en definitivan bazon de ilia kredo. Tiel c'i tiuj movadoj povas konsiderati kiel kultojn, au' kristanajn sektojn. Inter ili estas:

**Atestantoj de Jehovo**

**Mormonoj**

**Baha'i**

Ekzemple la organizaj'o de Atestantoj de Jehovo konata kiel Biblio de Gardanta Turo kaj Asocio de pamfletoj (faldfolioj) akcentas la prediktaj'ojn de la lastaj tempoj kaj estas antau'vidintaj sed sensukcese la finon de la mondo. La atestantoj de Jehovo limig'as en la socian vivon ne partoprenante kiel regulon, en tiaj aktivecoj kiel sangotransfuzio, celebrado de naskig'tagoj, au' aliaj festotagoj (inkluzive la naciajn Kristnaskon, Paskojn, Tagon de Patrinoj), balotado, j'uro antau' la blazono kaj militista servo. Tiel ili enmetas muron inter si kaj la cetera parto de la socio.
Partizanoj de Baha'i pretendas ke ili reprezentas la kulminon de c'iuj religioj en la mondo. Ili ne kredas ke Jezuo estis la sola Mesio, vera, kies lecionoj valoras porc'iame. Ili reduktigas la gravecon de Jezuo en la pasintan epokon kaj subkomprenigas ke Li estas anstatuig'inta jam de ilia mesio Bah'ullah. La sekvantoj de tiu movado asertas ke "kun Bah'ullah estas naskig'inta nova epoko de matureco kaj ni devas au'skulti liajn vortojn..ili konsideratas la lasta potenco en la c'iuj aferoj de religio".Baha'i pretendas esti universala religio kaj se la homoj kredus lau' tiu direkto estig'us universala paco.
Mormonoj estas same grupo de homoj kiuj nomas sin "Eklezio de Jezu Kristo kaj Sanktuloj de la pli postaj Tagoj". Ili asertas ke "Dio mem estis iam tiel kiel ni estas nun kaj Li estas homo plialtigita", " Kristo ne estas naskig'inta pere de Sankta Animo..sed . en la sama maniero sange kaj karaktere kiel okazis en la g'ardeno de Edeno..", " ke ekzistas teruraj pekoj kiujn la homo povas fari kaj tiuj enmetos la pekulon for de la preventa potenco de Kristo. Se tiuj pekoj estig'as, tiam la sango de Kristo ne purigos ilin de tiuj c'i pekoj ec' se ili pentas. Tial la sola espero ilia estas sangvers'i por prevento, tiom kiom estas eble por si mem".

**La Evangelia Protestana Eklezio**

La Evangelia Protestana Eklezio en Albanio komencig'as je 18an de oktobro 1873, kiam Berd, Dj'eni kaj s-ro Marsh lokig'as kiel misiistojn em la urbo de Manastir. Tie ili kreis la unuan evangelian komunumon kie partoprenis Gjerasim Qiriazi, kiu estis samtempe ankau' granda patrioto. Gjerasim kaj lia fratino , Sevasti malfermis en Korc'a la unuan lernejon de junulinoj je 23an de oktobro 1891. Je 14an de novembro fondig'is la komunumo "Evangelia frataro" kie partoprenis Gjerasim, Gjergj Qiriazi, Sevasti, Grigor Cilka, Herakli Bogdani, V. Pasko el Pogradec, Fanka Fthimi kaj probable P.N. Luarasi.

### 7.2.4. La religiaj alternativoj hodiau' en Albanio

**En la a**lbana preso ekde emultaj jaroj oni diskutas vaste c'u estas oportune ke albanoj plimulte plurestu muslimaj. Ec' la granda verkisto nuntempa, Ismail Kadare kelkfoje estas espriminta ke ni devas rekonvertig'i en la malnovan kristanan religion. C'ar tiamaniere ni plurestos parto de Eu'ropo.
Aliaj intelektuloj opinias ke religia rekonvertig'o ne estas ja kondic'o por ke ni akceptig'u de Eu'ropo kaj ke tio ne povas estig'i volontule , c'ar la religia aparteneco estas jam enradikig'inta fenomeno en la popolo kvankam ne fanatisme.
Tamen restas vidi kiel evoluos la stato de religiaj kredoj c'e ni.
Unuflanke la gejunuloj edukitaj en la laikaj lernejoj estas relative liberaj kaj ne emaj frekventi la religiajn instituciojn, ne parolante c'i tie por aparteni al la religio de iliaj gepatroj au''antau''nintoj. Aliflanke, danke al la religia potenca propagando multaj gejunuloj frekventas regule la preg'ejojn kaj moskeojn, ec' multaj muslimoj pilgrimas al Meko, portas longan barbon ks.
Kelkaj aliaj estas c'irkau'brakintaj la novajn religiajn sektojn kristanajn kaj nebibliajn, c'efe pro pragmatisma celo (samtiel ankau' historie agis iliaj antau'enintoj) por certigi al si vizon al Okcidento, por trovi laborpostenon au' studan stipendion, geedzon ks.
Rigardante retroirade la religian pasinton de albanoj, la maltrankviloj por la nasko de religiaj konfliktoj en de la lando au' por la religia disdivido de albanoj ne vers'ajnas estig'i iam.

**Ervin C'anga**